



IE IL P O P O L A Ĉ I N I O

中國報道

7 1987



Centjara Jubileo
de Esperanto

大山畫社
1987年1月
畫





Bano

Foto de ČJU ŪEJBO

Enhavo


JUBILEA JARO DE ESPERANTO:

Al EPĈ, por la centjara jubileo de Esperanto	2
Vortoj de Ĉu Tunan memore al la centjara jubileo de Esperanto	3
Vortoj de Ĝoŭ Gŭangĝaŭ omaĝe al la centjara jubileo de Esperanto	3
Ĉinio staras por diskonigo de Esperanto	4
Defio de la homaro al Dio	5
Versoj por la centjara jubileo de Esperanto	5
Esperanto kreis eblecon por la homa interkompreniĝo	6
Iom pri la historio de la ĉina Esperanto-movado	9
ESP-NOVAĴOJ	53
POR KOMENCANTOJ: "Eĉ unu tagon mi ne vane pasigos."; Neenuiga ludo	36
Pli da loĝareo por la urbanoj de Pekino	14
Ponto inter entreprenoj	21
Post lupreno	23
Sukcese solvita historia problemo	26
VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (7): De Serŝju al Kangding	46
Ĉina tablotenis hieraŭ kaj morgaŭ	33
TRA NIA LENSŬ: Motorcikla konkurso de kampa ranĵoj (Kolora bildoserio)	37
Koresponda konsultiĝo pri longviveco	43
ĈINA LITERATURO:	
La Ĝjan'an-a literaturo, Caŭ Caŭ kaj liaj filoj	56
Elektitaj poemoj de Caŭ Caŭ kaj liaj filoj	59
ĈINAJ ARTOJ: Ĉinaj ventumiloj	28
Ĉinaj beligistoj	62
Kultura ruino de 5 000 jaroj	40
Por ke ĉiu familio havu apartamenton	67
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Ĉinaj alumet-markoj	60
KURANTAJ AFEROJ	65
KORESPONDI DEZIRAS	25, 64
SUR LA KOVRILO: Neĝlotusoj (Kazaĥa ĝenro)	de SA GENĜSI
INTERNE DE LA KOVRILO: Bano	Foto de ĈJU ŬEJBO
INTERNE DE LA DORSKOVRILO: ĈINAJ POŝTMARKOJ	
SUR LA DORSKOVRILO: Pejzaĝo de Uling	Foto de KONG JI

JARABONTARIFO	Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio \$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50										

Al EPĈ, por la centjara jubileo de Esperanto

de HU ĈJAŬMU*



Hu Ĉjaŭmu

Nun multe disvastiĝas Esperanto, kiun antaŭlonge oni enkondukis en Ĉinion. Kaj ĉ. 400 000 ĉinoj lernas Esperanton. Tiu nombro estas rimarkinda kaj estas sufiĉe valora omaĝo al la centjara jubileo de Esperanto. La Esperanta revuo EPĈ konstruis ponton de interkompreno inter la esperantistoj de Ĉinio kaj multaj aliaj landoj. Ankaŭ ĝia laboro estas omaĝo al la centjara jubileo de Esperanto.

Jam antaŭlonge Esperanto havis progresan signifon en Ĉinio. Tiuflanke almenaŭ tri grandaj ĉinaj verkistoj ludis gravan

rolon en la kulturaj rondoj. Unu estas Lusin. Li ĉiam subtenis Esperanton. Lia subtenado al blinda rusa poeto s-ano Eroŝenko estis vaste influa en la komenca periodo de la nova literaturo de Ĉinio. Ĉiu, kiu legis "Kriojn", konas la grandan amikecon inter ili. Alia estas Hujucz. Krom tio, ke li el-esperantigis nemalmultajn novelojn, li ankaŭ vojaĝis al Moskvo kiel esperantisto kaj verkis la faman broŝuron "Unu Semajno en Moskvo". Kaj la tria estas Bakin. Antaŭlonge li ellernis Esperanton kaj tradukis el Esperanto nemalmultajn fremdlandajn literaturajn verkojn.

La nunaj veteranaj gvidantoj de la Esperanta movado de Ĉinio estis partoprenantoj kaj daŭrigantoj de la movado de maldetekstruloj en la 30-aj jaroj. Kompreneble nuna tasko estas tute alia. Ĉinio nun praktikas socialismon kaj tio, kion ni bezonas, estas unuanime fari konstruadon kaj reformadon, konservi la pacan internacian medion kaj disvolvi la amikecon kun ĉiuj popoloj. Mi deziras al EPĈ pli grandan sukceson en disvolvo de tia amikeco. □

* *La aŭtoro estas membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj honora prezidanto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj. Li verkis la artikolon laŭ nia peto por la centjara jubileo de Esperanto.*


Vortoj de Ĉu Tunan* memore al la centjara jubileo de Esperanto



Ĉu Tunan

La komuna lingvo komunikas pensojn harmonie, ĉiuj landoj de la mondo intimiĝas familie.

* Ĉu Tunan, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj la prezidanto de la



"Amikoj de Esperanto". La versparo estis farita laŭ peto de la redakcio de EPC.

Vortoj de Ĝoŭ Ĝuangĝaŭ* omaĝe al la centjara jubileo de Esperanto



Ĝoŭ Ĝuangĝaŭ

Pliigu la interŝanĝon kaj akcelu la amikecon!

* La aŭtoro estas la prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj membro de la Triamonda Akademio de Sciencoj.

加強交流 增進友誼

賀世界語誕生 100周年

周光召

Ĉinio staras por diskonigo de Esperanto

de HU ŜENG*



Hu Ŝeng

Ĉiu nacia lingvo en la mondo havas longan historion kaj intiman rilaton kun sia nacia kulturo. Se iu intencas nuligi nacian lingvon, kompreneble li ne povas nek devas tion fari. En la nuna mondo sendependiĝis la sklavigataj kaj subpremataj kolonioj kaj dependaj landoj, kaj oni devas respekti ilian rajton uzi kaj disvolvi sian nacian lingvon por helpi ilin disvolvi sian nacian kulturon. Aliflanke, en la nuna mondo multe plifortiĝas la interrilatoj kaj reciprokaj influo kaj dependo inter diversaj landoj kaj nacioj. Tiel estas same en ekonomio, politiko kaj kulturo. Ĉiu ajn lando, kiu volas vivi kaj disvolviĝi, ne devas sin izoli de la ekstera mondo. Kontraŭe, ĝi devas pli amplekse kaj pli intime kontaktiĝi kun aliaj landoj. Ĉiam kreskas la rilatoj de komunaj intereso kaj kaŭzitaĵoj de tio, ke ĉiuj landoj batalas por la mondpaco kaj por la disvolviĝo de ekonomio, scienco kaj tekniko. Tial oni pli sentas urĝan bezonon de komuna lingvo inter ĉiuj landoj kaj nacioj. Oni ne sukcesis kaj des pli ne sukcesos unuecigi la mondon per unu aŭ du naciaj lingvoj.

Kvankam Esperanto estas artefarita lingvo, tamen ĝia centjara praktikado pruvis, ke ĝi estas vivanta lingvo. Ĝi sin bazuas sur pluraj naciaj lingvoj, asimilis iliajn fortaĵojn kaj forigis iliajn komplikaĵojn kaj neregulaĵojn. Multaj mondfamaj literaturaj verkoj povas esti bone tradukitaj en Esperanton, kio estas la plej evidenta pruvo, ke ĝi havas grandan vivipovon.

D-ro Zamenhof, la kreinto de Esperanto, opiniis, ke oni povas fondi egalrajtan kaj fratecan familion de la homaro pere de la komuna lingvo. Kvankam tio portas iom da utopio, tamen ekster la naciaj lingvoj ekzistas agnoskita komuna lingvo, kiu ludas grandan rolon por akceli la interkomprenon inter ĉiuj nacioj kaj helpi la komuniĝon kaj kulturan interŝanĝon inter ĉiuj landoj kaj nacioj kaj ludas sendube ankaŭ pozitivan rolon por akceli la ekonomian kaj kulturan disvolviĝon de ĉiuj nacioj.

La ĉina lingvo estas unu el la lingvoj uzataj de plej multe da homoj en la mondo, kaj Ĉinio estas unu el la landoj plej fervoraj en lernado kaj apliko de Esperanto. Defendi la mondpacon, disvolvi la amikan kunlaboron inter ĉiuj landoj kaj akceli la komunan ekonomian prosperon estas la ĉefa celo de Ĉinio en la internaciaj aferoj.

La demokratiigo de la internaciaj rilatoj estas tendenco jam formita kaj plifortiĝanta tagon post tago. Ĉinio ĉiam persistas en la principo, ke egalrajtaj estas ĉiuj landoj, ĉu grandaj ĉu malgrandaj, ĉu riĉaj ĉu malriĉaj, ĉu fortaj ĉu malfortaj. Malfermi pordon al eksterlando estas unu el la bazaj politikoj de Ĉinio. Ni persistas en la longdaŭra plivastigo kaj disvolvo de la ekonomia, komerca, teknika kaj kultura interŝanĝoj kaj kunlaboroj kun aliaj landoj, surbaze de egaleco kaj reciproka utilo. Mi opinias, ke diskonigi Esperanton kaj peni fari ĝin komuna lingvo agnoskita de la mondo estas tute konforme al tiu baza politiko aprobita kaj subtenata de la ĉina popolo. □

* La aŭtoro estas la prezidanto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj kaj membro de "Amikoj de Esperanto". En la juneco li lernis Esp. kaj redaktis "La Mondo". Li verkis la artikolon laŭ nia peto.



Ĉen Haŭsu

Laŭdire, timante, ke la homaro unuigōs kaj potenciĝos, Dio semis malakordon inter la malsamaj popoloj, sekve formiĝis diversaj lingvoj en la mondo. Kiel estaĵo de la universo la homaro ne estas senpova antaŭ Dio. Kaj antaŭ cent jaroj iu iniciatema polo faris defion al Dio. Li kreis artefaritan lingvon kiel ponton de interkompreno inter ĉiuj popoloj kaj tiel akcelis la grandan unuiĝon de la homaro. Kiel oni scias, tiu polo estas respektinda d-ro Zamenhof. Lia artefarita lingvo estas nenio alia ol Esperanto nun vaste diskonigata sur la tero.

Defio de la homaro al Dio

de ĈEN HAŬSU*

Estas fierinde por la ĉina popolo, ke Ĉinio estas unu el la gravaj kaj vivoplenaj fortoj en la batalo por realigi la idealon de Zamenhof. Komence de la nuna jarcento Ĉinio jam havis terenon por diskonigi Esperanton. Antaŭ la centjara jubileo de Esperanto Ĉinio per sukcesa okazigo de la 71-a UK manifestis al la tuta mondo sian varman kaj fortan subtenon al la idealo de Zamenhof.

Ni esperas, ke la homaro fine venkos en la 21-a jc. la lingvan malfacilon kaŭzitan de Dio. Ne ekzistos tiam la lingva baro en la komuniĝo inter ĉiuj popoloj. Eĉ se oni ne uzos Esperanton tiurilate, oni emocije mencias en tiu tago la kreinton de Esperanto Zamenhof — lia idealo faris gravan kontribuon por la progreso kaj unuiĝo de la homaro. □

* *La aŭtoro estas vicurbestro de Pekino kaj honora prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio. Li verkis la artikolon laŭ nia peto.*

Versoj por la centjara jubileo de Esperanto

de DŬANMU HONGLJANG*

*Je verdo pleniĝas la valoj kaj montoj,
Centjarjubileon celebras la rondoj.
Disfloras la koroj interkomprenante
Kaj verŝas la sentojn amikajn de l' mondo.*

* La aŭtoro estas fama ĉina verkisto kaj membro de "Amikoj de Esperanto".



Dŭanmu Hongljang kaj lia edzino

La poemo estis verkita por la centjara jubileo de Esperanto.



S-ro Roman Malinowski

Esperanto kreis eblecon por la homa interkompreniĝo*

— Interparolo de s-ro Andrzej Pettyn** kaj la prezidanto de la pola parlamento Roman Malinowski, la alta protektanto de la 72-a UK

Demando: Sinjoro Prezidanto, kio kaŭzis, ke vi akceptis la honoran protektantecon de la 72-a Universala Kongreso, ĉu vi rimarkis en Esperanto valorojn, kiuj igis vin akcepti la protektantecon?

Respondo: Mi pensas, ke estas multe da valoroj. Doktoro Zamenhof kreante Esperanton, kiu ja estas lingvo tre simpla, trovis adeptojn en la tuta mondo, li iniciatis la movadon ne nur de lingvouzantoj, sed ankaŭ de la homoj, konsciaj pri la bezono de globskala interkompreniĝo. Ja multajn problemojn de la nuntempa mondo, ne malgrandigante la signifon de iliaj fundamentaj kialoj, kaŭzas manko de kompreniĝo, aŭ de la deziro interkompreniĝi. Mi pensas, ke multe pli pura estus la internacia klimato, se ne ekzistus tiuj problemoj, kiuj rezultas nur el la manko de kompreniĝo. Kiom pli rapide oni povus solvi multajn, ja komplikajn problemojn de la nuntempa mondo, se ĉiuj politikistoj, ĉiuj homoj sekvus la sintenon de aktiva kompreniĝado. Kaj mi pensas, ke Esperanto kreas globskale, en la skalo de la tuta homaro, la eblecon interkompreniĝi. Krome, ĉiu nacio, ĉiu ŝtato havas sian kulturheredaĵon, sed en ĉi tiu kulturheredaĵo enestas parto de la tuthomara kulturo. Mi pensas, ke Esperanto, la agado de esperantistoj, ĉio ĉi kreas ankaŭ la eblecon firmigi en la tuthomara memoro tiujn valorojn de la kulturheredaĵo de la tuta homaro. La mondo fariĝas pli kaj pli malgranda pro la kreskanta kundependeco, tutmondiĝo de problemoj, kiuj igas pli kaj pli koncentri la komunan atenton sur ilia solvado, ĉar tio apartenas al la intereso de ni ĉiuj. Plifirmigante la komu-

nan heredaĵon, ni devas ĉiam pli koncentriĝi sur tio, kio estas komuna por nia kontinento. La saman pensmanieron oni povas rilatigi al ĉiuj regionoj de la mondo. Mi pensas, ke ĉi-koncerne la lingvo Esperanto kaj ĉi tiu socia movado de la homoj dezirantaj realigi altajn celojn, atingi la klimaton de pli bona interkompreniĝo kaj kunlaboro, meritas specialan rekonon.

Demando: La strebado al kunlaboro konsistigis la vivovoĵon de Doktoro Zamenhof, kiu samkiel vi naskiĝis en Bialistoko, ĉu ĉi tiu fakto de la deveno el la sama urbo ankaŭ influis vian decidon akcepti la honoran protektantecon?

Respondo: Mi jam diris al la kolegoj, kiam ili venis al mi kun la propono akcepti la honoran protektantecon de la kongreso, ke la ĉefa premiso de la decido enestas en la esenco mem de la E-movado, kiu kreas kondiĉojn por pli bona interkompreniĝo, kunlaboro. Alia premiso estas la fakto, ke ni estas samurbanoj. Mi ne konis lin persone, ĉar mi ne povis koni, sed kun la personeco de Zamenhof mi kvazaŭ kreskis kaj maturiĝis kaj ĉi tiu personeco akompanis min ekde la junaĝo, ĉar li estas tre konata en Bialistoko. Mi povas diri, ke ni ĉiuj estas fieraj pri tio, ke Zamenhof devenis ĝuste el Bialistoko, ni estas fieraj pro la fakto, ke la interkompreniĝo, kiun li kreis, fariĝis bono de la tuta homaro.

Demando: Ĉu laŭ via opinio, Sinjoro Prezidanto, en la historio de Bialistoko estas periodo, pri kiu oni devus scii, aŭ pri kiu vi volus mencii?

Respondo: Mi estas sub la granda impreso de la kruelaĵoj de la Dua Mondmilito en Bialistoko, de la mondmilito, kiu kaŭzis grandan tragedion por la getto en ĉi tiu urbo. La getto okupis duonon de la urbosurfaco. En Bialistoko loĝis multe da poloj juddevenaj, kiuj estis kunkreintoj de la bialistoka kotona, lana kaj ĝenerale leĝera industrio. Mi memoras, ke verŝajne en la unua tago de la komenciĝo de la Dua Mondmilito estis detruita per bomboj la bialistoka sinagogo. Preskaŭ ĉiujn la faŝistoj neniigis en la getto. Ĉio ĉi forte fiksiĝis en mia memoro. Tio ankaŭ estis premiso, kiu igis min akcepti la honoran protektantecon de la kongreso en la 100-jariĝo de la lingvo, kreita de bialistoka kuracisto.

Demando: Ĉu lige kun Zamenhof kaj Bialistoko vi havas iajn atendojn por estonteco?

Respondo: Bialistoko estas ligita kun Zamenhof, mi — kiel persono naskiĝinta en ĉi tiu urbo, kaj ankaŭ honora protektanto de la kongreso — revas pri tio, ke Bialistoko fariĝu Mekko por la esperantistoj de la tuta mondo. Pro tio, mi pensas, ke okaze de la kongreso estus pripensinda starigo de internacia fondaĵo, kiu efektivigus tie elkonstruon de internacia esperantista centrejo je la nomo de Zamenhof, kio estus omaĝo al la krento de Esperanto, kiu centrejo servus al la esperantistaro de la tuta mondo.

Demando: Certe la ideo estas pripensinda, tio estus unu el la plej belaj iniciatoj okaze de la

100-jariĝo de Esperanto. La ĝisnuna vojo, tra kiu antaŭeniris la E-movado, ne estis facila. Multaj esperantistoj opinias, ke en la daŭro de 100 jaroj oni jam devus atingi la plenan tutmondigon de la lingvo. . .

Respondo: Mi volas diri, ke Esperanto kompare kun aliaj lingvoj estas tre juna lingvo, se ni komparos ĝin kun naciaj lingvoj aŭ kun la lingvoj, kiuj funkcias kiel internaciaj en diplomatio, ĉar ili havas pli longan tradicion. Se ni prenos en konsideron la ekzisto-periodon de Esperanto kaj la movadon, kiun ĝi kreis, tiam — ĉi tiel mi pensas — oni devas paroli pri rapida progreso de Esperanto. Eble iam UNO akceptos Esperanton kiel lingvon, kiu inter kelkaj lingvoj estos oficiala. Mi kredas, ke la vasteco de la medioj utiligantaj Esperanton povas alkonduki al la rekono de la lingvo ankaŭ en diplomatio, en UNO, en internaciaj organizaĵoj, kiel unu el la laborlingvoj.

Demando: Vi menciis pri UNO, pri rekono en diplomatio, sed por tio oni devus vastigi la instruadon de la lingvo. Esperantistoj jam delonge klopodas enkonduki la lingvon en la lernejojn por tiamaniere mondscale popularigi ĝin. Kion vi opinias pri tio?

Respondo: Mi estas por la evoluo de multaj aferoj, inter ili ankaŭ de la lingvo Esperanto laŭ tre naturaj meĥanismoj. Mi

Palaco de la Kulturo kaj Scienco

Foto de **BOCZKOWSKI**



pensas, ke plej multe por popularigi Esperanton, konsiderante ĝian valoron, povas fari la esperantistoj mem. Laŭ mia orientiĝo en Pollando la Pola Esperanto-Asocio ne utiligas ĉiujn eblojn por popularigi la lingvon, sed povas esti, ke la sama situacio estas ankaŭ en aliaj landoj. Mi kredas, ke se oni pli vaste utiligus ĉi tiujn eblojn, tiam eble montriĝus pli granda bezono pri la lingvo mem, kaj tiam ni ankaŭ povus atingi la instruadon de la lingvo en lernejoj. Pro tio, ke la enkonduko de la lingvo en la lernejojn devus respondi al iom vasta bezono, ĉi tiu unue devas ekesti. Mi opinias, ke la esperantista organizaĵo devus pli vaste konigi sian agadon al diversaj medioj, pli vaste montri la simplecon de la lingvo kaj facilan ellerneblecon, la eblojn de rapida interkomunikiĝado en internacia skalo, kontaktojn, kunlaboron. Tio estas faktoro, kiu montras la avantaĝojn de la lingvo kiel komunikilo.

Demando: En internaciaj kontaktoj tiu interkomunikiĝado plej ofte efektiviĝas sur la ŝtupo de ŝtatestoj, politikistoj, homoj edukitaj, kiuj konas fremdajn lingvojn, sed dume mankas amasa interkomunikiĝado kaj kontaktoj inter la mezaj civitanoj de unuopaj landoj, ekzemple laboristoj, kamparanoj, kiuj ne ĉiam havas tempon por lerni fremdajn lingvojn. Ĉu vi eble iam prikonsideris, Sinjoro Prezidanto, ke se ekestus la ebleco de libera interkompreniĝado per unu simpla komuna lingvo diversŝtupe kaj globskale, kian signifon ĉi tio povus havi por la atingo de interkompreniĝo, kiun celas la politikistoj?

Respondo: Mi pensas, ke tio kreus pli firman bazon, pli bone povus solvi tiujn problemojn, kiujn kaŭzas la nuntempa mondo, en kiu ja ekzistas la neceso interkompreniĝi kaj kunlabori en ĉiuj sferoj. Mi pensas, ke tiu bezono interkompreniĝi, kunlabori, krei kompreniĝon kaj fidon kaŭzas ankaŭ tion, ke la internaciaj kontaktoj disvolviĝu ne nur sur la ŝtupo de politikistoj, ŝtatestoj, organizaĵoj, intelektuloj, reprezentantoj de kulturo de unuopaj medioj, sed ke en ĉiam pli alta grado ili estu kontaktoj amasaj, sociaj, de ĉiuj medioj, ĉiuj sociaj strukturoj. En ĉi tiu sfero la lingvo Esperanto povas krei tiajn naturajn kondiĉojn de la realigo de la interkompreniĝo de ĉiuj. Kaj tia bezono en la nuntempa mondo estas, kiel ŝajnas, aparte forta, estas objektiva bezono pro la komuneco de nia sorto.

Demando: En viaj vortoj, Sinjoro Prezidanto, mi sentas grandan simpatian por nia E-movado, kio nin tre ĝojigas. Tre grava por nia E-movado estos la varsovia kongreso, kiu fiksos planojn por la

estonta agado. Kiajn esperojn vi persone ligas kun ĉi tiu kongreso, kiel la alta protektanto?

Respondo: Mi pensas, ke la renkontiĝo de tiuj ĉirkaŭ 6 000 personoj en Varsovio, la kongreso mem, povos krei pliajn impulsojn por la universaligo de la lingvo, kio kreas la kondiĉojn por pli bona interkompreniĝo, pliajn impulsojn por pli konkreta utiligo de la lingvo en estonteco.

Demando: Sinjoro Prezidanto, via nomo estas bone konata al la esperantistaj aŭskultantoj de Radio Polonia pro la multaj intervjuoj, kiujn vi donis al nia radiostacio, ĉu do vi volus ion diri rekte al niaj aŭskultantoj?

Respondo: Mi volus direkti al ĉiuj esperantistoj miajn tutkorajn bondezirojn. Mi volus deziri, ke la kongreso, kiu okazos en Varsovio, bone servu al la plua universaligo de la lingvo, kiu kreas globskale la plej larĝajn kaj plej plenajn eblecojn de interkompreniĝado, kaj ke samtempe ĉi tiu renkontiĝo kontribuu al la kunkreado de la klimato de interkompreniĝo kaj kunlaboro kaj ankaŭ fido en la tuta mondo. Tio estas tre bezonata por forigi la endanĝerigojn, kiujn la nuntempa mondo portas, sed ankaŭ por krei la klimaton servantan al ĉiuj ĉi agadoj kaj iniciatoj, kiuj estos aparte valoraj por la paca sorto de la tuta homaro.

Demando: Sinjoro Prezidanto, ĉi tiun intervjuon ekkonos ankaŭ la legantaro de unu el la plej altnivelaj E-revuoj en la mondo "El Popola Ĉinio", vi vizitis pasintjare Ĉinion antaŭ la 71-a UK en Pekino, kiaj ĉefaj impresoj restis ĉe vi post via vizito?

Respondo: Unuavice impresis min la grandaj transformiĝoj, kiuj efektiviĝas en Ĉinio, la granda kulturheredaĵo, kiu estas ankaŭ komuna kulturheredaĵo de la tuta homaro. Ege impresis min la vere grandioza laboro, grandaj reformoj kaj la pordmalferma politiko. Mi kredas, ke tio kontribuos al la rapida evoluo de Ĉinio. Ankaŭ ĝojigaj estas la plivastiĝantaj duflankaj kontaktoj polaj-ĉinaj en diversaj sferoj, kiuj kontribuas al la profundiĝo de la kunlaboro inter Pollando kaj Ĉinio en la intereso de niaj du landoj, sed — mi kredas — ilia graveco transpasas la duflankecon. □

* *La titolon faris nia redakcio kaj la tekston de la intervjuo ĝi iom mallongigis.*

** *S-ro Andrzej Pettyn estas akademiano kaj respondeculo de la Esperanta sekcio de Radio Polonia.*

lomo pri la historio de la ĉina Esperanto-movado

de HOŬ ĜIPING

Pasis jam pli ol 80 jaroj, de post kiam Esperanto enkondukiĝis en Ĉinion en la lastaj jaroj de Ĉing-dinastio. Ĝi eniris en Ĉinion tra tri kanaloj. La unua estis tiu tra Rusio. Iuj esperantistoj-komercistoj lernigis Esperanton en Harbin kaj Ŝanhajo kaj tiel ĝi enradikiĝis unue en tiuj du urboj. Alia estis tiu tra Japanio. Ĉinaj studentoj lernantaj en Japanio, kiaj Liŭ Ŝipej, Ĝang Ĝji kaj Ĝing Mejĝiŭ, lernis Esperanton ĉe la japana anarkiisto s-ro Oosugi Sakae. Reveninte en sian patrolandon, ili sin dediĉis al diskonigo de Esperanto en Ĉinio. La tria estis tiu tra la Okcidenta Eŭropo. Iuj el la ĉinaj studentoj lernantaj en Francio, Germanio kaj Britio, kiaj Hŭa Nanguj, Ŝju Lunbo, U Ĝihuj, Jang Zenggaŭ kaj Ĉaj Ĵuanpej, eldonis eksterlande "Ĥina-Esperanta Scienca Literatura Revuo" kaj "La Novaj Tempoj" por konigi Esperanton al enlandaj ĉinoj aŭ, reveninte en sian patrolandon, sin dediĉis al popularigo de Esperanto.

La ĉina Esperanto-movado trairis kvar etapojn post sia

enkondukiĝo en Ĉinion. De la enkondukiĝo ĝis la unua duono de 1931 estas ĝia unua etapo. En tiu tempo pro la Unua Mondmilito kaj la enlandaj militoj la Esperanto-movado en Ĉinio estis plurfoje sufokita, tamen ĝi jam diskoniĝis en Ĉinio kaj neniu povis malhelpi ĝian disvolviĝon. En tiu etapo ĝi havis tri karakterizaĵojn:

La unua karakterizaĵo estas, ke granda parto de la unuaj esperantistoj estis studentoj lernantaj eksterlande. Ili estis fervoraj por propagando kaj de Esperanto kaj de anarkiismo. Ili opiniis, ke la anarkiistoj de ĉiuj landoj devas preni Esperanton kiel komunikilon por interŝanĝo de informoj kaj interkompreniĝo. Tiuflanke, Liŭ Ŝifu estis reprezentanto. En 1913 li fondis la revuon "La Voĉo de la Popolo" en Kantonon kaj tutforte pledis por anarkiismo kaj Esperanto.

La dua karakterizaĵo estas, ke Esperanto unue aperis en ĉemaraj urboj en la orienta kaj suda partoj de Ĉinio kaj poste etendi-



Liŭ Ŝifu, pioniro de la ĉina Esperanto-movado

ĝis al la landinterno. Ŝanhajo la unua starigis sian Esperanto-asociacion, ĝin sekvis Kanton, Ŝenjang, Ĉangŝu, Ĝangĝoŭ, Ĉĵuangŝoŭ, Ĉingdaŭ kaj Fuĝoŭ kaj poste Esperanton ekkonis Nankino, Ĉangŝa, Ĥankoŭ kaj Ĉengdu.

La tria karakterizaĵo estas vigliĝo de la Esperanto-movado en la edukaj organizoj. Ĉar Esperanton subtenis eminentuloj de la edukaj kaj kulturaj rondoj, kiel Ĉaj Ĵuanpej, Ĉjan Ŝĵuantong kaj Lusin. En 1912 Ĉaj Ĵuanpej ekfunkciis kiel la unua eduka ministro de la Respubliko de Ĉinio kaj instrukiis malfermi Esperanto-kurson en la instruistaj altlernejoj de la lando. En 1917, kiam li estis la rektoro de la Pekina Universitato, li difinis Esperanton kiel nedevigan lernobjekton. Ankaŭ iuj altlernejoj en Ŝanhajo kaj Kantonon ekfunkciigis Esperanto-kurson. En 1922 fondiĝis la Pekina Esperanta Kolegio kaj en 1926 la Kantona Esperanta Instituto. La du lernejoj elbakis multajn esperantistojn.

La dua etapo daŭris de la dua duono de 1931 ĝis 1949, kiam naskiĝis la popola respubliko. La evidenta trajto de tiu etapo estas, ke la Esperanto-movado grandpaŝe progresis en praktikado. La movado kombiniĝis kun la naci-sava movado, la naciliberiga movado kaj la nova kultura movado de Ĉinio, tiel ke ĝi enradikiĝis en la ĉina teritorio.

La 18-an de septembro 1931 la japanaj imperiistoj provokis agresan militon kontraŭ Ĉinio, tuj okupis la tri provincojn en nordorienta Ĉinio kaj rekte minacis la sekurecon de norda Ĉinio. La naci-savaj movadoj de studentoj en Pekino kaj Ŝanhajo levigis unu post alia. En tia situacio grupo da junaj esperantistoj kun Hujucz kiel la ĉefo fondis la Ĉinan Proletan Esperantistan Union en Ŝanhajo en novembro 1931. Ilia slogano "Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio" estis disefita inter la esperantistoj de Pekino, Kanto, Uhan, Ĉengdu, Ĉangŝa kaj aliaj urboj. Per Esperanto ili faris internacian propagandon,

malkaŝis la agreson de la faŝistoj kaj prikantis la bravajn batalojn de la ĉina kaj alilandaj popoloj. Famaj Esperantaj revuoj tiutempe estis "Ĉinio Hurlas", "Radio", "Al la Nova Etapo", "Voĉoj el Oriento", "Heroldo de Ĉinio" kaj "Jurnalisto".

Aliflanke, ĉinaj esperantistoj esperantigis multajn ĉinajn literaturajn verkojn, kiaj "Elektitaj Noveloj de Lusin", "La Arĝenta Jubileo de la Literatura Agado de Kuo Moĵo", "Patrineto", "Nova Vivo", "Nova Tasko" kaj "Reveno", kaj ankaŭ ĉinigis multajn literaturajn verkojn sovetajn, orienteŭropajn, nordeŭropajn kaj japanajn, kio forte akcelis la kulturen interŝanĝon inter Ĉinio kaj aliaj landoj.

Krome, en la mezo de la 30-aj jaroj la ĉinaj esperantistoj ĉinigis artikolon pri latinigo de la ĉina skriba lingvo en soveta Esperanta revuo, kio vekis la atenton de la ĉinaj kulturaj rondoj. Poste nemalmultaj ĉinaj esperantistoj sin dediĉis al la


movado por latinigo de la ĉina skriba lingvo kaj tiel akcelis ĝian reformadon.

Por diskonigo kaj popularigo de Esperanto multe laboris kaj rimarkinde sukcesis "La Mondo" de la Ŝanhaja Esperantista Asocio, "La Lumo de Esperanto" de la Bejping-a Esperantista Ligo, semajna revuo por la ĵurnalo "Shijie Ribao", "La Espero" de la Esperanta Asocio en Hankoŭ, "Verda Flago" de la Ĉengdu-a Esperanto-Asocio kaj "Jan'an-a Esperantisto" de la Jan'an-a Esperantista Societo, krome ankaŭ la Ĉongĉing-a Koresponda Esperanto-Lernejo. Tamen la pli-oldek-jara milito forte atakis la Esperanto-movadon. En multaj urboj, precipe en la regionoj okupitaj de Japanio, la movado preskaŭ stagnis.

La tria etapo etendiĝis de 1949 ĝis 1976. En tiu etapo la Esperanto-movado revigliĝis kaj progresis pro tio, ke la ĉina popolo jam tenis la politikan potencon, tamen ĝi suferis repuŝojn.

Nelonge post la liberiĝo de Pekino okazis, sub la gvido de

Lusin (sidanta, la tria de dekstre), V. Eroŝenko (sidanta, la kvara de dekstre) kaj membroj de Esperanta societo de Pekino en 1922





Partoprenantoj de la 2-a ĵarkunveno de la Hango(Hangoŭ)a Esperanto-Asocio en 1930

Hujucz, tri esperantistaj kunsidoj, en kiuj oni diskutis, kiel servi al la nova Ĉinio per Esperanto, starigi landan Esperantan organizon kaj eldoni Esperantan revuon. En majo 1950 fondiĝis "El Popola Ĉinio" kaj en la sekvanta jaro la Ĉina Esperanto-Ligo. Poste disvolviĝis Esperantaj aktivadoj en Ŝanhajo, Ŝĵian, Ĉongĉing, Kantono, Ŝenĵang, Tjanĝin k.a. En tiu periodo Ĉinio sendis delegaciojn al landaj Esp-kongresoj de Pollando, Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Japanio kaj la 44-a UK kaj samtempe gastigis esperantistojn el pli ol dek landoj.

En julio 1963 okazis en Pekino la Unua Tutlanda Esperanta Labor-kunsido. Vicĉefministro Ĉen Ji ĉeestis la kunsidon kaj faris varman paroladon. Li proponis okazigi UK en Pekino, kio forte kuraĝigis la tutlandan esperantistaron. Post tiu kunsido la Alteduka Ministerio de Ĉinio instrukciis, ke altlernejo instruu Esperanton, se ĉe ili la kondiĉoj estas maturaj. Estis 11 altlernejoj, kiuj plenumis la instrukcion. En decembro de la sama jaro Radio

Pekino komencis Esperantan disaŭdigon, kaj la tuta esperantistaro de la mondo ekaŭdis la voĉon de Pekino.

Sed bedaŭrinde, la kultura revolucio de 1966 ĝis 1976 atakis nian movadon kaj dum tiu tempo preskaŭ ĉesis agadi la lokaj organizoj.


Post tiu tumulto la ĉina Esperanto-movado revigliĝis kaj venis ĝia kvara etapo, kiu havas jenajn karakterizaĵojn:

Unue, Esperantaj organizoj establiĝis preskaŭ en ĉiuj landpartoj. Krom ke Ĉinio havas sian landan organizon ĈEL, la plej granda parto de ĝiaj provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj fondis Esperantajn organizojn kaj 93 grandaj kaj mezgrandaj urboj starigis tiajn organizojn. Kaj plie, la movado nun disvolviĝas de la landinterno al la landlimaj regionoj, de urboj al la kamparo. Iuj landlimaj urboj kaj gubernioj jam starigis siajn Esp-organizojn. La plejparto de la ĉina loĝantaro vivas en la kamparo. Tiu tendenco metos firman bazon por nia

movado kaj havos signifon nesubtakseblan.

Due, pli kaj pli vigliĝas la Esperanto-movado de sciencistoj kaj teknikistoj. Post la fondiĝo de la Sciencista-teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj aperis en la lando 14 fakaj Esperantaj societoj en fervojaj, medicinaj kaj trafikaj entreprenoj kaj provincaj kaj urbaj scienc-teknikaj organizoj. Ili havas amikan kontakton kun alilandaj samspecaj organizoj. La kontakto inter ĉinaj kaj alilandaj sciencistoj kaj teknikistoj pluapaŝe akcelas la kombiniĝon de scienco kaj tekniko kun Esperanto kaj utilas al la disvolviĝo de la Esperanto-movado de la mondo.

Aparte menciindas, ke la Ĉina Akademio de Sciencoj simpatias al la Esperanto-movado. Ĝia eksprezidanto Lu Ĝjaŝji, ĝia eksvicprezidanto Jan Dongŝeng kaj ĝia nuna prezidanto Ĝoŭ Ĝuangĝaŭ alte taksis la rolon de Esperanto en la scienc-teknika interŝanĝo kaj kuraĝigis ĉinajn sciencistojn kaj teknikistojn ellerni tiun utilan instrumenton.



Vicĉefministro Ĉen Ji (la dua de dekstre) vizitis Esperantan ekspozicion en 1963.

Ankaŭ multaj aliaj ĉinaj sciencistoj aprobas Esperanton. Nun la Ĉina Akademio de Sciencoj ĵardecidis okazigi en 1988 en Pekino la Duan Internacian Akademian Konferencon pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto. Hu Ŝeng, prezidanto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, alte taksis la gravecon de Esperanto por la homaro kaj ĝian rolon en la kampoj ekonomia, kultura kaj scienc-teknika. Tio donas brilan perspektivon al la ĉina Esperanto-movado en la scienc-teknika kampo.

Trie, okulfrape progresas la Esperanta instruado. Post de-

cembro 1982, kiam la Eduka Ministerio de Ĉinio refoje informis, ke oni prenu Esperanton kiel nedevigan lernobjekton, pli kaj pli multaj junuloj de Ĉinio interesiĝis pri Esperanto. Por sin adapti al tiu nova situacio la Ĉina Esperanto-Ligo kune kun la Pekina Fremdlingva Instituto kaj la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto funkciigis ses Esperanto-kursojn por instruistoj de dekoj da altlernejoj kaj elbakis kvalifikitajn Esperanto-instruistojn. En la lastaj jaroj 65 altlernejoj funkciigis Esperantajn kursojn, i.a. nedevigajn kursojn kun 5 000 lernantoj. Sep radiostacioj kaj

unu televida stacio funkciigis Esp-kursojn. Esperantaj korespondaj lernejoj kaj kursoj kreskas en Ĉinio kiel fungoj post pluvo. Nun la nombro de lernantoj jam superis 400 000, inter kiuj estas laboristoj, kamparanoj, soldatoj, instruistoj, kuracistoj, raportistoj, inĝenieroj, teknikistoj, oficistoj kaj kadroj, kaj ili plejparte estas junaj.

Kvare, rimarkinde kreskas la nombro de naciminoritataj esperantistoj. Ĉinio estas lando kun multaj naciecoj. En la lastaj jaroj multaj naciminoritataj junuloj eklernis Esperanton. En 1985 dekoj da esperantistoj el 14 naciminoritatoj ĉeestis la Unuan Ĉinan Kongreson de Esperanto. Inter la lernantoj de la Ĉina Koresponda Esperanto-Instituto troviĝas mongoloj, hujoj, ĝuangoj, uĝuroj kaj koreoj. Nun oni kompilas lernolibron kaj vortarojn en Esperanto kaj naciminoritataj lingvoj.

Kvine, pli kaj pli multiĝas Esperantaj eldonaĵoj. De post 1979 la Ĉina Esperanto-Eldonejo, lokaj eldonejoj kaj Esperantaj organizoj eldonis 278 librojn kun 3 700 000 ekzempleroj, kion ne konis la historio de la ĉina Esperanto-movado. Estas 16 tipografie presitaj Esperantaj gazetoj, kiaj "La Mondo", "Tutmondaj Scienco kaj Tekniko", "Voĉo de Esperanto", "La Esperanta Lernilo", "Esperantisto", "Veterana Esperantisto", "La Espero", "Informilo pri Espmovado" kaj "La Verda Stelo Brilas super la Monto Taishan". Aperas ankaŭ pli ol 200 mimeografitaj Esperantaj gazetoj. Tiuj eldonaĵoj ludas gravan rolon en diskonigo de Esperanto, en interŝanĝo de informoj pri Esperanto-movado kaj spertoj, kaj en helpo al esperantistoj en ilia lernado.

Sese, kreiĝas socia medio favora al Esperanto. De la lastaj jaroj la ĉina registaro praktikas la politikon malfermi la pordon al eksterlando kaj vigligi la ekonomion enlande kaj prenas kiel bazan ŝtatan politikon la modernigan konstruadon de la lando kaj defendon de la mondpaco. La registaro laŭdas la rolon de Esperanto en la ekonomia, kultura, scienc-teknika interŝanĝoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj kaj en defendo de la mondpaco, kaj pli eksplicite apogas nian movadon. Diversaj popolaj organizoj, kiaj laboristaj sindikatoj, la Komunisma Junulara Ligo kaj virinaj federacioj, varme subtenas la aktivadon de diverslokaj Esperantaj organizoj. La societo "Amikoj de Esperanto" iniciatita antaŭ kelkaj jaroj de personuloj de diversaj ĉinaj rondoj havas pli ol 130 membrojn, inter kiuj estas famaj politikistoj, sciencistoj, edukistoj kaj literaturistoj. Ankaŭ la ĉina ĵurnalismo simpatias al nia movado. La centraj kaj lokaj gazetoj, ĵurnaloj, radiostacioj, televidaj stacioj ofte raportas pri Esperanto kaj ĝia movado en diversaj lokoj.

Sepe, oftigās la internacia kontakto. De post 1978 la ĉina esperantistaro intensigis sian kontakton kun UEA kaj iuj landaj Esp-organizoj. En 1980 ĈEL aliĝis al UEA. De tiam Ĉinio sendis delegacion al UK ĉiujare kaj iafoje al Esperantaj aktivadoj en iuj regionoj kaj landoj. En la lastaj jaroj rimarkinde kreskis la nombro de esperantistoj, kiuj vojaĝis al Ĉinio. Esperantistoj de dekoj da ĉinaj urboj korespondas kun eksterlandaj esperantistoj. Aparte menciindas, ke la 71-an UK en Pekino ĉeestis pli ol 1 600 esperantistoj el 54 landoj. Tia kontakto multe plifortigis la in-



La Stabo de la Centra Oficejo de la Ĉina Esperanto-Ligo en Ĉunkino (Ĉongĉing) en 1946



Hujucz (la dua de dekstre), vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj laborantoj de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de "El Popola Ĉinio" en 1985

terkompreniĝon kaj amikecon inter la ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj, antaŭenigis la Esperanto-movadon kaj favoras la mondpacon.

Kun la oftigo de la internacia kontakto, la monda esperantistaro alte taksas la rolon de

Ĉinio. En kaj post 1981 Bakin, Hujucz kaj Ĉen Jŭan estis elektitaj kiel membroj de la Honora Patrona Komitato de UEA. Mi kredas, ke la amika kunlaboro de la ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj certe alportos novan vigecon al la internacia Esperanto-movado. □

Pli da loĝareo por la urbanoj de Pekino

La loĝantoj de ju pli grandaj urboj okupas des pli malvastan loĝejon, kion montris la unua ĝenerala enketo pri la loĝkondiĉoj de urbanoj en la fino de 1985. Tion ekzemplis la tri municipoj de Ĉinio. En Ŝanhajo la pokapa loĝareo estis 5.24 kvadrataj metroj, en Tjanĝin — 5.42 kaj en Pekino — 6.1. La tri plej grandaj urboj de Ĉinio estas la plej grandaj suferantoj de manko de loĝejoj. Tie en sama ĉambro loĝas du generacioj aŭ malsamseksaj adoleskaj infanoj kaj eĉ tri generacioj. Laŭ la statistiko, pli ol kvarono de la familioj en la tuta lando disponas pri nesufiĉa loĝareo dum en la grandaj urboj ĉ. 40% de la familioj ne havas sufiĉan loĝareon.

“Fakte estis ne malrapida la konstruado de la loĝdomoj en Pekino. De 1949 ĝis la fino de 1986 oni entute konstruis loĝdomojn kun areo de 58 milionoj da kvadrataj metroj,” tiel diris al mi respondeculo de la Urbo-konstrua Komisiono de Pekino. “En la lastaj jaroj ĉiujare en Pekino oni konstruis 4.5 milionojn da kvadrataj metroj. En 1980 la pokapa loĝareo estis 4 kvadrataj metroj kaj en la fino de 1985 tiu atingis 6.1 kvadra-

tajn metrojn. Sole en 1986 fin-konstruiĝis loĝdomoj kun areo de 5.01 milionoj da kvadrataj metroj, kio kreis la rekordon en la pekina domkonstruado. La areo egalas trionon de la totala areo de la loĝdomoj de Pekino antaŭ 1949. Tiu rapido okupis la unuan lokon ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en la tuta mondo.

Kial do tiel serioze mankas loĝdomoj al pekinanoj, dum grandajn sukcesojn akiris la urbo en la domkonstruado? Koncerne tion la respondeculo diris al mi, ke tion kaŭzis multaj faktoroj:

Unue, la ŝtata ekonomia konstruado bezonas grandan monsumon. Kvankam la ŝtato elspezis por la konstruo de loĝdomoj grandajn monsumojn, kiuj konsistigis grandan pocenton de la investaĵoj por la urba fundamenta konstruado, tamen estis nesufiĉaj. En la 6-a Kvin-jara Plano (1981-1985) de Ĉinio la investaĵoj de Pekino por loĝdomoj konsistigis 22% de la totalaj investaĵoj de la fundamenta konstruado kaj atingis 5.2 miliardojn da jŭanoj. Unuvorte, kvankam oni faris multajn laborojn, tamen oni ne povis kontentigi la bezonon kaj devas fari ankoraŭ pli multe.

Due, la nombro de la urbaj loĝantoj ekspansias tro rapide. Krom la natura kresko de urba loĝantaro, ankaŭ ĝia mekanika kresko estas pli rapida ol tiu de la aliaj urboj. Ĉiujare en Pekinon transloĝiĝis multaj homoj kaj la totala nombro de loĝantoj videble superos 10 000 000. Tial la kresko de la loĝantaro nuligis tiun de la loĝdomoj. Precipe en la troloĝataj centraj kvartaloj de la urbo la nesufiĉeco de loĝdomoj estas pli serioza.

Trie, estas serioze neegala la loĝareo okupita de la loĝantoj. Por iuj familioj la pokapa loĝareo estas malpli ol 4 kvadrataj metroj, dum por aliaj tiu superis 14 kvadratajn metrojn.

La respondeculo montris, ke por solvi la problemon pri la loĝdomoj, oni devas fari du aferojn: a) reformi la nunan regularon pri la urbaj loĝdomoj kaj b) ekspluati latentajn fortojn sur la nuna bazo kaj bonigi la loĝkondiĉojn.

Ekde la fondiĝo de la nova Ĉinio la ŝtato praktikas bonstatigan sistemon en loĝdoma konstruado kaj distribuado, t.e. la ŝtato asignis grandajn monsumojn por konstrui loĝdomojn,

distribuis ilin al urbaj loĝantoj kaj postulis tre malmulte da lupago. Kvankam la sistemo estas utila al loĝantoj malmulte enspezantaj, tamen la praktiko montris, ke tiu metodo havas multajn malavantaĝojn. Unue, la ŝtato ne povas repreni la monsumojn investitajn por loĝdoma konstruado kaj fari eĉ simplan reprodukon de la loĝejoj kaj plie la tro malalta dom-lupago eĉ ne povas kovri la elspezon por la dom-riparado kaj prizorgado, tial la ŝtato ĉiujare elspezas pli ol 10 miliardojn da jŭanoj por loĝdoma konstruado kaj riparado. Due, la malalta lupago stimulas onin okupi pli da loĝejoj, kio intensigis la kontraŭdirojn de malegaleco en distribuado de la loĝejoj kaj sekve la konstruitaj loĝdomoj ne povas plene doni sian socialan efikon. Nun en Ĉinio la laboristoj kaj oficistoj ĝenerale nur



Loĝdomoj ĉe Andingmen

elspezas ĉ. 1.5 % de sia monata enspezo por lui la loĝejon, tial la lupago neniel povas ludi la rolon reguligi la bezonon de loĝejoj. La malfavora saldo inter la malalta domlupago kaj produktokosta lupago fakte rapidigas konsumon de la ŝtataj investaĵoj al la dom-

konstruado, kio efektive estas nevidebla granda subvencio de la ŝtato al la loĝantoj. Alivorte, ju pli da ĉambroj oni okupas, des pli da subvencio ili ĝuas. Tio objektive instigas iujn okupi pli multajn kaj pli bonajn loĝejojn. Ju pli multe la ŝtato

Transloĝiĝo



konstruas domojn, des pli peze ĝi ŝarĝas sin per la subvencio. Rezulte de tio ĝi ne povas realigi bonan cirkuladon de la investaĵoj de loĝdomoj. Cetere, tiu ĉi sistemo kaŭzis ankaŭ tian fenomenon, ke privatuloj ne volas aĉeti domon kaj investi monsumon al domkonstruado, kaj fine koncentrigas la monsumojn de loĝantoj al aĉeto de kolora televidilo, fridujo kaj aliaj altklasaj objektoj, kio malrapidigas la disvolviĝon de la domkonstrua kaj konstrumateriala industrioj kaj dom-biena negoco.

Kun ĉiam pli profundiĝanta reformado de la ekonomia strukturo jam fariĝis neevitebla tendenco ŝanĝi la bonstatigecon de la urbaj loĝdomoj kaj varigi la loĝdomojn. En la lastaj jaroj Ĉinio faris provadon varigi la loĝejojn en multaj urboj. Ankaŭ Pekino vendis malgrandan parton da loĝejoj kaj akiris certajn spertojn kaj planas vendi loĝejojn ekde 1987.

Reformi la lupagon de loĝdomoj estas grava parto de la reformo de la sistemo pri loĝdomoj. Sed nun, ĝenerale dirite, la urbaj loĝantoj enspezas malmulte, se la ŝtato postulus ke ili pagu la domrenton laŭ varo-domo, tio certe malutilus al ilia vivnivelo. Ĉar tio koncernas financan, bankan, salajran kaj aliajn faktorojn, tuj reformi la lupagon de loĝdomoj estas ege malfacile. Tial la reformo devos esti paŝo post paŝo efektivigata surbaze de la financa kaj salajra sistemoj.

La alia rimedo por solvi la problemojn estas kiel eble plej multe investi al la domkonstruado kaj pliiĝi la aplikeblecon interne de loĝejoj sur la nuna bazo. Antaŭe la investo al domkonstruado devenis de la ŝtato

sola, sed nun ĝi devenas ne nur de la ŝtato, sed ankaŭ de la entreprenoj, kolektivoj kaj individuoj. Kiu investas, tiu uzas la loĝejon. Pro la troloĝateco kaj aliaj kaŭzoj, fakuloj opinias, ke en la proksima estonteco la pokapa loĝareo en Pekino ne povos pliiĝi multe. Oni povas nur pliraciigi strukturon de la loĝejoj kaj beligi la eksterdoman medion laŭ la ŝanĝoj de familia strukturo kaj vivmaniero. Sub la premo ne altiĝi la produktokoston, oni povas laŭeble projekti la loĝdomojn pli oportunaj, ekz. variigi la strukturon de loĝejoj: grandaj dormoĉambroj kun malgranda salono, malgranda kaj granda dormoĉambroj kun granda salono k.a., por kontentigi la bezonon de malsamaj profesiuloj. Kaj por grandigi la aplikeblan spacon oni devas laŭeble utiligi murangulojn kaj apliki plafonajn konservejojn. En la projektado oni devas doni apartan atenton al aranĝo de la instalaĵoj, ekonomiaj kaj oportunaj instalaĵoj por tualetejo kaj kuirejo, kaj al racia aranĝo de diversaj tuboj kaj lokoj por hejmaj elektraĵoj.

Krome, oni devas, laŭ ekonomia principo, projekti altajn, pluretaĝajn, Y-formajn, U-formajn, ventradajn kaj segilformajn loĝdomojn anstataŭ forme monotonajn.

Konstruante la novajn loĝdomojn Pekino donas apartan atenton al la totala plano pri la urba dispozicio kaj konstruado de loĝkvartaloj kun kompletaj funkcioj.

Por mildigi la troloĝatecon de la urbocentro, oni planas konstrui satelitajn urbojn en la malproksimaj antaŭurboj kaj gubernioj de Pekino kaj tien transloĝigi parton de la urbanoj. Nun

fundamente finkonstruitaj satelitaj urboj estas Hŭangcun de Daŝing-gubernio, la guberniaj urboj Ĉangping, Tongŝjan kaj la distrikto Janŝan, ĉiu kun teatroj, kinejoj, bibliotekoj, sporthaloj, lernejoj, hospitaloj, vendejoj kaj aliaj publikaj amuzejoj kaj servoj. Ĉar tiuj satelitaj urboj havas kompare grandan porproduktan kaj porvivan spacon kaj komfortan vivmedion, multaj institucioj de la urbocentro volonte transloĝiĝis tien. Nun en ĉiu satelita urbo vivas ĉ. 200 000 konstantaj loĝantoj.

La ekspluato kaj konstruado de loĝkvartaloj kun kompletaj funkcioj estas unu el la gravaj rimedoj de la magistrato de Pekino por plibonigi la loĝkondiĉojn de la urbanoj. Antaŭe konstruitaj loĝdomoj estas samaltaj etaĝdomoj unu apud alia vicigitaj, kio impresas monotone, dum la nunaj domoj en la novaj loĝkvartaloj havas diversajn formojn kaj aspektas harmonie kaj bele en la tuto. Por kompletigi la instalaĵojn, beligi la medion kaj oportunigi la vivon en la loĝkvartaloj, oni starigis tie necesajn servajn, kulturajn kaj amuzajn establaĵojn, plantis florojn kaj arbojn kaj faris loĝkvartalojn ĝardeneskaj.

Samtempe en konstruado de novaj domoj, la magistrato de Pekino organizas fortojn por malkonstrui kadukajn domojn, transformi kaj ekipi malnovtipajn domojn per sistemoj de centra varmado, gaso kaj kranakvo.

La loĝdoma konstruado sendube estos unu el la ĉefaj taskoj de la urba fundamenta konstruado de Pekino en la estonteco. Estas espereble, ke ĉiu familio en Pekino havos komfortan apartamenton antaŭ la fino de la nuna jarcento. □



Loĝkvartalo Gonggüancun en nokto

Loĝkvartalo Sjibjanmen ĉirkaŭita de verdaĵo





Loĝkvartalo Ŭanĉjŭanhe



En apartamento



Promenejo

Muzika fontano en loĝkvartalo





Nova dombloko

Parto de nova loĝkvartalo



Ponto inter entreprenoj

— Pri la Ĉefurba Klubo de Entreprenistoj en Pekino

En iuj landoj, la klubo de entreprenistoj certe estas populara, sed en Ĉinio ĝi aperis en grandaj kaj mezgrandaj urboj dum la lastaj jaroj, kun la profunda disvolvigo de la reformo de urba ekonomia sistemo. Antaŭ nelonge mi intervjuis la Ĉefurban Klubon de Entreprenistoj faman en Ĉinio.

La oficejo de la klubo estas malgranda ĉambro en la dua etaĝo de la Nacia Kultura Palaco de Pekino. En ĝi estas kelkaj tabloj, ŝrankoj por dokumentoj kaj du telefonoj, kaj tie laboras ĉ. 10 oficistoj. Jen estas ĝia konstanta labororgano. Kvankam la klubo estas malgranda, tamen ĝi havas kontaktojn kun pli ol cent grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj de pli ol tridek profesiaj branĉoj de Pekino. Ĝin ofte vizitas fabrikestroj, direktoroj, ĉefinĝenieroj, ĉefekonomikistoj kaj ĉefkontistoj.

La estro de la departemento pri informa interŝanĝo de la klubo s-ro Ĝang Ŝjueĉin diris al mi: "Nia klubo ne estas distrejo, sed aktivejo por entreprenistoj de la industria, komerca, ekonomia, financa kaj ĵurnalisma rondo. Entreprenistoj venas tien ĉi por fari kunlaboron en ekonomia administrado, disvolvo de produktado, progresigo de tekniko, interŝanĝo de informoj, plivastigo de merkato kaj aliaj flankoj, por akceli interkomprenon kaj amikecon inter

la entreprenoj de Pekino kaj tiuj de aliaj provincoj kaj landoj kaj por plifirmigi la ligojn inter la entreprenoj kaj koncernaj fakoj de la registaro, celante akceli ekonomian prosperon kaj disvolvigon de Pekino."


Komence de 1985, la produktado de la Pekina Unua Fabriko de Ĉiutagaj Kemiaĵoj, la Pekina Televidilo-fabriko kaj aliaj entreprenoj estis grandanombre disvendataj, sed manko de monrimedoj malhelpis ilian rapidan produktadon. Laŭ ilia peto la ĵus fondita klubo invitis respondeculojn de kelkaj ĉefaj bankoj de Ĉinio por fari dialogon kun la entreprenistoj. Dank' al ĝia helpo la entreprenoj ricevis respektive krediton de dek milionoj

da ĵuanoj en la daŭro de du semajnoj, kio garantiis la normalan produktadon. Vicdirektoro de la Pekina Unua Fabriko de Ĉiutagaj Kemiaĵoj s-ro Sun Ĝoĵi diris al mi: "Laŭ la malnova regularo, por akiri krediton la entreprenoj devis prezenti sian petskribon laŭvice al siaj superaj instancoj unu post alia. Kaj poste la petskribo malsupreniris reterne al la entreprenoj. Foje oni ricevis eĉ neniun groŝon, foje oni devis atendi kelkajn monatojn. Nun, pere de la klubo, respondeculoj de bankoj persone venas al entreprenoj kaj solvas la malfacilojn nur en unu semajno. Kiel bone kaj rapide!"

Pro manko de eteno kiel krudmaterialo, la Pekina Dua

Reprezentantoj de kluboj de entreprenistoj diskutas pri faka laboro.





Interŝanĝo de informoj

Fabriko de Kemiaj Akceliloj jam ĉesis produkti antaŭ unu monato. La klubo tuj kontaktis la etenoproduktantan kemiaĵ-fabrikon "Ĉjanĝin" sub la Janŝana Petrol-kemia Kompanio de Pekino. Nur post kelkaj tagoj ree ekfunkciis la maŝinoj de la fabriko.

La klubo ofte okazigas raportkunvenon kaj esplorkunvenon por ke la entreprenistoj havu ŝancon rekte fari dialogon kun koncernaj departementoj de la registaro kaj kune studu la malfacilojn aperintajn en la reformo de ekonomia sistemo. En la unua duonjaro de 1985, netaŭga premia regularo difinita de la ŝtato premis la aktivecon de iuj pekinaj entreprenoj, kiuj produktis eksportaĵojn, tiel ke la unua duonjara eksporta plano de Pekino ne estis plenumita. Laŭ peto de tiuj entreprenoj la klubo invitis gvidantojn de eksterkomerca departemento de Pekino aŭskulti opiniojn de la entreprenoj. Poste la departemento tuj modifis kaj suplementigis la regularon, kio multe vigligis produktan aktivecon de la entreprenoj. Rezulte de tio, oni

plenumis la jarplanon kaj tiel gajnis pli multe da fremda valoro.

La klubo ofte okazigas renkontiĝojn de entreprenistoj kaj respondeculoj de la Ŝtata Komitato de Reformado de Sistemoj kaj de la departemento pri ŝtata ekonomia plano por kune studi la problemojn pri reformo kaj ekonomia disvolviĝo. Respondeculo pri ŝtatsistema reformo diris al mi: "Tiuj aktivadoj estas tre utilaj. Ili ebligas al ni rekte aŭskulti opiniojn de entreprenistoj kaj koni novajn problemojn. Tio multe helpas nin analizi ekonomian situacion de entreprenoj kaj ellabori koncernajn politikojn." Ankaŭ la entreprenistoj opinias, ke la ofta ĉeesto de tiuj aktivadoj plivastigas ilian vidkampon kaj konigas al ili ekonomian reformon kaj situacion de la ŝtato, kio favoras pli bonan administradon de iliaj entreprenoj kaj gajnon de alta ekonomia efiko.

La klubo ofte funkciigas specialajn kursojn, en kiuj prelegas specialistoj en- kaj eksterlandaj. Ĝi faris multajn laborojn por

altigi la kapablon kaj kvaliton de administrantoj.

Ĉu estas hazarde, ke aperis la organizoj, kia klubo de entreprenistoj en Ĉinio? Ne, tute ne! Post plenumita disvolvo de la reformo de urba ekonomia sistemo, por vigligi ekonomion, Ĉinio reformis la antaŭan altcentralizitan administradon super la entreprenoj laŭ la profesia sistemo kaj iom post iom havigas al la entreprenoj pli multe da povo por ke ili transformiĝu el la tipo de la produktaĵa ekonomio en tiun de la komercaĵa ekonomio. La ŝtato ne plu rolas kiel vartistino de la entreprenoj, kiu respondecis pri livero de krudmaterialoj kaj aĉeto de iliaj produktaĵoj. Nun la entreprenoj jam fariĝis relative memstaraj administrantoj de komercaĵa produktado, kiuj metas sur sin la respondecon pri profito kaj malprofito. Por bone funkciigisian entreprenon oni atentis la ekonomian efikon kaj zorgas la informojn de merkato.

La malnova administra sistemo de produktado katenis la entreprenojn. Post la reformo de ekonomia sistemo kvankam la entreprenoj havas pli da decidpovo kaj altigis sian vivipovon, tamen ili ĉagreniĝas pri blinda produktado pro duonizolita aktivado en vasta merkato kaj manko de akurataj informoj. Tio foje eĉ ĵetis la administradon de entreprenoj en pasivecon kaj kaŭzis al ili eviteblajn perdojn. Ĝuste sub tia situacio naskiĝis la transprofesiaj organizoj, kia klubo de entreprenistoj, kiu kontaktas diversajn socitavolojn kaj liveras informojn. Ĝi estas novnaskitaĵo, konsilanto de entreprenoj kaj helpanto de la registaro. Kiel informoserva ponto, ĝi ludas specialan rolon en la ekonomia aktivado. □

Post lupreno

“Paĉjo, ne forgesu kunporti libron,” mia filino diris, informiĝinte, ke mi volas iri al barbirejo.

Ŝia atentigo rememorigis al mi pri okazaĵo en la pasinta jaro. Iutage, kiam ŝi kaj mi kune iris al la barbirejo Ganĝjakoŭ, proksima al mia hejmo, pro longa vicatendo mi perdis unu horon kaj duonon — tiufoje mi havis ĉe mi neniun legaĵon.

Mi vizitadis tiun barbirejon proksimume 20 jarojn. Preskaŭ ĉiufoje mi devis vicatendi longe por hartondo. Tia fenomeno ne estis mirinda en Pekino dum multaj jaroj en la pasinteco. La kaŭzoj estis diferencaj, sed la ĉefa estis egalismo en la salajrado. En multaj barbirejoj ĉiuj barbiroj estis sendistinge salajrataj, ĉu ili laboris multe aŭ malmulte, bone aŭ malbone. Oni nomas tion manĝi el la granda kaldrono.

Barbiro Li Ĝifu, kiu laboris tie pli ol 10 jarojn, diris al mi: “Iumonate, mi laboregis ĉiutage, sed tute ekster mia atendo, en la monatfino, oni donis al mi krom la salajro kaj subvencio por almanĝaĵoj nur premion de 4 jŭanoj, kiuj ne sufiĉis eĉ por aĉeti unu kilogramon da rubandfiŝo.” Tio kompreneble vundis ilian laborentuziasmon.

Mi prenas kiel ekzemplon la barbirejon Ganĝjakoŭ. Tie laboras sume 30 barbiroj, kiuj malofte ĉiuj venis al la laboro, kaj iam laboris nur 5 aŭ 6 barbiroj, dum la ceteraj forestis pro


diversaj kaŭzoj. Ili en laboro estis apatiaj al la klientoj. Tial la klientoj longe vicatendis. Malgraŭ ke en la barbirejo pendis

opini-kajero por la klientoj, ĝi efikis malmulte. Iuj klientoj prezentis siajn rimarkojn al ilia supera gvida organo, tamen



Virinoj frizataj

Barbiroj en laboro



ne ŝanĝiĝis la stato en la barbirejo.

Tiam al la barbiroj mankis laborentuziasmo, la ekonomia efiko de la barbirejo kompreneble estis malbona. Kaj ĝi situas en homplena loko, sed enspezis ĉiumonate nur ĉ. 6 000 jŭanojn.

Ĉifoje, atentigite de mia filino, kun gazeto mi iris al la barbirejo. Estis la 10-a atm, kiam mi atingis la barbirejon, mi trovis neniun sur la kanapoj destinitaj por atendantaj klientoj. Mi ekdubis, ĉu oni ne laboras tiutage. Venis barbirino, kiu kun rideto petis min al la salono. Tiam mi trovis, ke la 30 sidlokoj senescepte estas okupitaj kaj la barbiroj laboras absorbite.

Ho, same kiel ĉiuj aliaj barbirejoj en Pakino, ankaŭ la barbirejo Ganĝjakoŭ posedata de la ŝtato estas luprenita kaj entreprenata de kolektivo.

Dank' al tio, la klientoj ne plu longe vicitendis, kaj ankaŭ la profito de la barbirejo multe altiĝis. Ĝia direktoro Dong Ĝuangde diris al mi, ke januare ĉijare ĝi enspezis 15 000 jŭanojn, el kiuj ĝi pagis al la ŝtato imposton de pli ol 2 000 jŭanoj, restigis al si mem profiton de la sama sumo, kio estis senprecedenca.

S-ro Dong diris plu, ke krom la salajro la laboristoj ĉiu povas ricevi monpremion superlaborinte. Unu el la nove difinitaj reguloj de la barbirejo tekstis, ke la barbiroj por viroj ĉiumonate devas plenumi la kvoton de 250 jŭanoj kaj tiuj por virinoj 540 jŭanoj. Duono de la superplenumita enspezo estas premiita al la barbiroj por la viroj kaj kvarono al la barbiroj por la virinoj. Januare ĉijare barbirino Dŭan Fengling ricevis 360 jŭanojn krom la salajro, dum la aliaj premiitaj almenaŭ ĉ. 200 jŭanojn.

Ke la nova sistemo multe levis la ekonomian profiton de la barbirejo, tio rezultis de tio, ke oni ŝanĝis la egalisman distribuan principon kaj burokratisman komercadon kaj la laboristoj multe levis sian laborentuziasmon. Ekz. nun la luprenintoj havas rajton dungi kaj maldungi la laboristojn laŭ ilia konduto. La luprenintoj povas maldungi tiujn, kiuj malobservas la labordisciplinojn kaj ne volentas korekti siajn erarojn, kaj premii tiujn, kiuj laboras fervore, servas bone al la klientoj, kaj talentulojn en administrado. Post la luprenita barbirejo entreprenas memstare, respondecas mem pri siaj profito kaj defcito kaj pagas imposton laŭ la difino, dum la rekompencoj de la laboristoj strikte ligiĝas kun ilia laboraktiveco kaj laborkvalito, la stato de la entrepreno koncernas la interesojn de la laboristoj, tio vekis ĉe la laboristoj maksimuman laborentuziasmon.

“Ĉu la barbiroj klopodas nur por labori multe sed neglekti la laborkvaliton post la luado?” demandis mi la direktoron.

“Jes, tio okazis en la komenco, malgraŭ ke ni ellaboris administran regularon pri eminenta servo,” respondis Dong. “Post iom da tempo multaj konis, ke proksime de ni funkcias pluraj barbirejoj luprenitaj. Se ni servos malbone kaj malleviĝos nia laborkvalito, do ne alvenos la klientoj. Tiel konsiderinte, ni pli kaj pli memvole plibonigas nian laborsintenon kaj laborkvaliton.”

En Pekino praktikas la luprenan sistemon ne nur la barbirejoj, sed ankaŭ 2 500 malgrandaj butikoj, servoj kaj riparejoj. Nun oni ekprovis tion ankaŭ en iuj profitodona mezgrandaj entreprenoj. Tion

diris al mi Sun Fuling, vicurbestro de Pekino.

Antaŭ nelonge mi vizitis la butikon de manĝaĵoj en la strateto Anjŭan de la Okcidenta Distrikto de la urbo.

Ĝi estas butiko kun areo de 48 kvadrataj metroj kaj 6 vendistoj. Ĝi prenis sur sin la taskon liveri manĝaĵojn al 600 familioj ĉirkaŭaj.

Malgraŭ ke la butiko kvarfoje ŝanĝis siajn direktorojn en mallonga tempo antaŭ la luado, ĝi havis defciton en pluraj sinsekvaj jaroj, rezulte de la egalisma salajrado. En tiaj grandaj malfaciloj la butiko ne povis daŭrigi sian komercadon kaj oni proponis ludoni ĝin: Ĉiu ajn en la butiko povas sin proponi kiel luprenanton kaj tiu estas rajtigita memstare administri la butikon. Krom la lupago kaj imposto la butiko povas mem disponi la profiton. Fine 40-jara vendistino Ĉen Ĵujfen estis elektita kiel luanto.

De la 1-a de aprilo de la pasinta jaro la butiko estis administrata de Ĉen kaj ŝiaj 5 kolegoj.

Estas diro pri komercado: “Certe gajnos vi dolarojn, se vi havos ĉiajn varojn. Se vanas mil alvokoj, efikas var-allogoj.” Antaŭ la lupreno, kvankam vendistoj de la butiko ofte tiel parolis, tamen same kiel aliaj vendejoj, ĝi negocis nur endome kaj vendis la varojn pogrande liveritajn de la koncernaj entreprenoj. Ĝi vendis nur tiujn varojn kaj neniom pli. Tial la venditaj varoj estis malmultspecaj kaj plie ofte elĉerpitaj. Oni devis viziti plurajn vendejojn por aĉeti kelkspecajn objektojn, sekve ke ili ofte grumblis kontraŭ la butiko. Post la luado la butiko iniciative pliigis la var-



En An'jüan-butiko

specojn kaj aldonis pli ol 40 specojn da varoj facile vendataj. Ĝi starigis komercan rilaton kun 22 pogradaj komercejoj. Nun ĝi mem aĉetas pogranda 80 % de la varoj. La butiko ĉiutage vendas la varojn de 400 jüanoj, duoble de la antaŭe venditaj. Por ŝanĝi la fenomenon, ke ne multaj vendistoj iras al la laboro, la butiko difinis, ke la sumoj de monpremio diferencas laŭ la asidueco kaj laborsinteno. Nun la vendistoj ĉiuj ĉeestas la laboron kaj fervore servas al la klientoj. Ĝia juna aĉetisto antaŭe ne volis transporti varojn, sed nun ĉiutage eliras por aĉeti varojn kaj transporti ilin al sia butiko aŭ klientoj, iam eĉ 4-5-foje unutage. Nun la vendistoj ĉiumatene vendas cigaredojn surstrate kaj dimanĉe portas varojn al la klientoj. Dank' al la harmonia kunlaboro de la direktoro kaj vendistoj, de la 1-a de aprilo ĝis la jarfino de la lasta jaro la butiko profitis 10 119 jüanojn, 10.43-oble pli multe ol en la antaŭa jaro kaj la meznombra pokapa monpremio atingis

693 jüanojn, kiuj estis 268 % de tiu en la antaŭa jaro.

Respondeculo de la Komerca Ministerio de Ĉinio diris al mi antaŭ nelonge, ke laŭ la statistikoj de 27 komercaj branĉoj de 24 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, proksimume centmiloj da malgrandaj komercejoj kaj servejoj aplikis luisistemon en 1986. Ilia plejparto estas ŝtatposedata kaj kolektive administrata, dum iuj ŝtatposedataj transformiĝis en kolektive posedatajn aŭ entreprenatajn de individuoj post luado.

Por ke la laboristoj kaj aliaj funkciuloj estu trankvilaj pri la venontaj aferoj, la ŝtato difinis, ke en ĉiuj unuoj ŝtatposedataj kaj kolektive entreprenataj laŭ la lu-kontrakto, la karaktero de la entreprenoj, ilia gvidateco kaj la rango de laborantoj restas neŝanĝitaj. Iliaj servojaroj estas kalkulataj inkluzive la tempon post la luado, ili ĝuas la saman rajton kaj estas traktataj kiel la samgradaj funkciuloj. Post emeritiĝo ili ricevos la saman pension kiel la aliaj. □

Tarifo: 1 internacia respondkupon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Juna lernantino, esp-istino de Jugoslavio dez. kor. kun ĉinaj gelernantoj kaj interŝanĝi pm. Mateja Lajh, Na Zelenici 9, 63000 Celje, Slovenia, Jugoslavio.

* Dez. kor. kun hungaraj esp-istoj pri diversaj temoj. Adr.:

1. Antal Zsuzsa (16-j.), str: Avintului 6/A/6, Loc: Miercurea-Ciuc, jud: Harghita, Rumanio.

2. Kelemen Haznal (16-j.), str: Salcii 5/B/1, Loc: Miercurea-Ciuc, jud: Harghita, Rumanio.

* 20-j. studento volas kor. kun ĉinaj gesamaĝuloj por ekkoni pli bone Esperanton, interesiĝas pri muziko, fremdaj lingvoj kaj kolektas bk. pm. adr.: Pawel Nowogorski, Mochnaczka Nizna 57, 33-383 Tylicz, woj, Nowy Sacz, Pollando.

* Ĉeĥa esp-ista klubo por junaj esp-istoj volas kor. kun amikoj el tuta mondo. Bonvolu skribi al: Oldriska Krouzkova, Habry 309, 58281, Ĉeĥoslovakio.

* 19-j. f-ino volas kor. kun junaj geesp-istoj de Ĉinio, kaj kolektas bk. mapojn. Adr.: Varga Csilla Lahti u. 34 III/11, Pécs, 7632, Hungario.

* 16-j. Benedek Jibor, 4455 Matei Str. Mica 107, Bistrita-Nasaud, Rumanio dez. kor. kun hungaraj esp-istoj pri diversaj temoj.

Sukcese solvita historia problemo

— Pri la subskribo de Ĉinio kaj Portugalio al la komuna deklaro pri la problemo de Aŭmen

La Komuna Deklaracio de la Registaroj de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Respubliko de Portugalio pri la Problemo de Aŭmen estis oficiale subskribita la 14-an de aprilo 1987, en Pekino.

La deklaro estis subskribita de Ĝaŭ Zijang, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, kaj Cavaco Silva, ĉefministro de la Respubliko de Portugalio, nome de iliaj registaroj respektive. La subskriban ceremonion ĉeestis Deng Ŝjaŭping, prezidanto de la Konsila Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj Li Ŝjannjan, prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko.


La deklaro proklamis, ke la regiono Aŭmen, inkl. de Aŭmen-duoninsulo, Dangzi-insulo kaj Luhŭan-insulo, estas teritorio de Ĉinio. La registaro de la Ĉina Popola Respubliko denove havos suverenecon super Aŭmen ekde la 20-a de decembro 1999.

Aŭmen situas ĉe la suda parto de la delto de Perlo-rivero. Ĝi, kun totala areo de 16.143 kvadrataj kilometroj, konsistas el Aŭmen-duoninsulo, Dangzi-insulo kaj Luhŭan-insulo. Aŭmen-duoninsulo, ligita kun la urbo Ĝuhaj de Gŭangdong, estas je 40 marmejloj fore de Hongkongo. Tie vivas pli ol 400 000 loĝantoj, el kiuj pli ol 97% estas ĉinoj kaj ĉ. 10 000 posteuloj de portugaloj.

Jam de antikve Aŭmen estas teritorio de Ĉinio. En 1557 portugaloj venintaj de malproksime subaĉetis la lokajn oficistojn de Gŭangdong kaj estis lasitaj fikloĝi tie. Post la Opia Milito, kiu eksplodis en 1840, profitante la malvenkon de Ĉing-registaro en la milito, la portugaloj rifuzis pagi imposton, forpelis la oficistojn senditajn de Ĉing-registaro kaj invadis la insulojn Dangzi kaj Luhŭan sude de Aŭmen-duoninsulo. En 1887 la koruptita Ĉing-registaro kaj la portugala registaro subskribis la Kontrakton pri la Ĉina-Portugala Kunveno (Provo) kaj la Ĉina-Portugalan Pekinan Kontrakton en Lisbono kaj Pekino respektive, kiuj kondiĉis, ke "Portuga-

Strato de Aŭmen





La subskriba ceremonio

lio okupos por eterne Aŭmen kaj administras ĝin kiel aliajn lokojn.” Tamen la kontraktoj estis forte malaprobataj de la ĉina popolo kaj neniam efektiviĝis interkonsento pri la dividlinio de la areo okupita de Portugalio. En 1979, kiam Ĉinio kaj Portugalio starigis diplomatajn rilatojn, la du registaroj atingis interkomprenon pri la suvereneco super Aŭmen kaj konsentis solvi la problemon redoni Aŭmen al Ĉinio per intertraktado de la registaroj de la du landoj en konvena tempo.

Post kiam oni solvis la problemon pri Hongkongo septembre de 1984, la registaroj de Ĉinio kaj Portugalio, surbaze de reciproka kompreno kaj cedado kaj post amika interkonsiliĝo, subskribis en Pekino la Komunan Deklaracion pri la Problemo de Aŭmen la 27-an de

marto 1987 kaj post 18 tagoj ĝi estis oficiale subskribita, tiel ke la grava problemo postlasita de la historio estis sukcese solvita.

Laŭ la principo “unu lando, du sistemoj”, la ĉina registaro proklamis sian fundamentan politikon pri Aŭmen: Laŭ la difino de la 31-a artikolo de la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko, kiam ĈPR denove havos suverenecon super Aŭmen, ĝi starigos la Aŭmen-an Specialan Administran Distrikton de la Ĉina Popola Respubliko, kiu estos gvidata rekte de la Centra Popola Registaro de ĈPR. Krom diplomataj kaj nacidefendaj aferoj traktataj de la Centra Popola Registaro, la distrikto havos la rajtojn pri administrado kaj leĝdonado, sendependan jurisdikcion, finan juĝrajton kaj aliajn superajn aŭtonomajn rajtojn. La ĉina registaro ellaboros

kaj publikigos surbaze de la konstitucio la fundamentan leĝon de la Aŭmen-a speciala Administra Distrikto, kiu difinos, ke post la fondiĝo de la speciala distrikto, ĝi, same kiel Hongkongo, tenos la ekzistantajn socian kaj ekonomian sistemon kaj vivmanieron por 50 jaroj. La ekonomiaj interesoj de Portugalio kaj aliaj landoj en Aŭmen estos protektataj, kaj ankaŭ la interesoj de la posteuloj de portugaloj estos leĝe protektataj.

La sukcesa solvo de la problemo pri Aŭmen estas alia grava evento kun historia signifo, post la solvo de la problemo pri Hongkongo. Ĝi plene kongruas kun la volo kaj interesoj de la popoloj ĉina kaj portugala, inkl. de la loĝantoj de Aŭmen. □

Ĉinaj ventumiloj

de JANG HONG*

*Jen, varmon someran
forpelas ĉi tiu venteto,
en nokto kvieta venigas ja
tuj malvarmeton.*

La supraj versoj de historiisto kaj literaturisto Ban Gu (32-92 p.K.) de la Orienta Han-dinastio (25-220 p.K.) pri bambua ventumilo diras, ke ventumilo povas forpeli varmon. Antaŭ dek jaroj oni trovis du bambuajn ventumilojn, unu kun longa tenilo kaj la alia kun mallonga, en tombo de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-25 p.K.), en Ĉangŝa. La unua simila al trapezo restas sendifekta, duvarpe kaj unu-vefte plektita el maldikaj bambuaj strioj 2 mm. larĝaj. En ĝia mezo troviĝas ornamaĵo plektita el pli maldikaj bambuaj strioj. Ĝia tenilo estas je 90 cm. longa kaj ĉirkaŭvolvita per flava silko. Ĝia farado jam atingis sufiĉe altan nivelon. La plej frua ventumilo trovita en arkeologia prifosado estas tiu de la malfrua Periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a. K.), elterigita en tombo de Ĉu-regno, en Ĝjangling, Hubej-provinco. Ĝia formo estas sama kiel tiu elterigita en Ĉangŝa. Ĝi surhavas delikatajn geometriajn desegnojn plektitajn el maldikaj bambuaj strioj kiel ĵus nigritaj kaj ruĝigitaj.

De la Periodo de Militantaj Regnoj ĝis Han-dinastio furoris tia trapeza bambua ventumilo. En Han-dinastio furoris ronda ventumilo plejparte el silko, malpeza kaj eleganta. Krome, tiam oni ofte uzis ankaŭ pluman ventumilon. Eminentuloj en la

periodo de Tri Regnoj, la Okcidenta kaj Orienta Ĝin-dinastioj kaj la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (220-589 p.K.) rigardis pluman ventumilon kiel simbolon de gracieco. Estis ankaŭ faldebla ventumilo, enkondukita, laŭdire, el la najbara lando Koreio, en Song-dinastio (960-1279 p. K.). En la unuaj jaroj de Ming-dinastio (1368-1644), dank' al propono de imperiestro disvastiĝis faldeblaj ventumiloj el papero.


Por beligi ventumilojn, oni ofte uzis valorajn materialojn, kiaj eburo kaj santala ligno, por fari iliajn tenilojn kaj ripojn, gravuris sur la teniloj delikatajn desegnojn kaj inkrustis ilin eĉ per gemoj kaj perloj. Por fari pli valorajn ventumilojn, oni petis famulojn fari sur ili kaligrafaĵojn kaj pentraĵojn. Historia libro notis, ke la fama kaligrafo Ŝang Ŝjiĝi (321-379 p. K.) de la Orienta Ĝin-dinastio (317-420 p. K.) foje vidis maljunulinon vendanta sesangulajn bambuajn ventumilojn. Ŝang skribis sur ŝiaj ventumiloj po kvin ideografiaĵojn. La maljunulino koleretis pro tio. Ŝang diris al ŝi: "Diru, ke la ventumiloj surhavas kaligrafaĵon de Ŝang Ŝjiĝi, kaj vendu ĉiun kontraŭ cent moneroj." La maljunulino plenumis lian konsilon, ke oni konkuris en aĉetado. Tio montris, ke en Ĝin-dinastio oni jam ŝatis kolekti ventumilojn kun kaligrafaĵoj kaj pentraĵoj de famuloj. El la kaligrafaĵoj kaj pentraĵoj de Song-dinastio estis

nemalmultaj por silkaj ventumiloj, kiel tiuj pri pejzaĝoj, floroj kaj birdoj, pavilonoj kaj homfiguroj. Eĉ imperiestro faris pentraĵon sur ventumilo, ekz. la kaligrafitaj versoj sur ronda silka ventumilo faritaj de la imperiestro Ĝaŭ Ĝji (1082-1135) de Song-dinastio estas fluaj kaj belaj. En la Muzeo de la Imperiestra Palaco en Pekino konserviĝas granda faldebla ventumilo, kiu surhavas pentraĵon pri floriguado en salika ombro kaj librolegado sub pino, faritan laŭdire de la imperiestro Ŝjunde de Ming-dinastio. Ĝi estas 152 cm. larĝa kaj plej granda el la ventumiloj de Ming-dinastio nun konservataj. Post Ming-dinastio furoris faldeblaj paperaj ventumiloj kun kaligrafaĵoj kaj pentraĵoj. En 1973 elteriĝis en Uŝjangubernio de Ĝjangsu-provinco faldebla orkolora ventumilo kun pentraĵo kaj kaligrafaĵo faritaj de kaligrafo kaj pentristo Ŭen Ĝengming (1470-1559) de Ming-dinastio. Ĝi estas valora objekto por koni la teknikon de faldebla ventumilo de tiu dinastio. En kaj post Ĉing-dinastio (1644-1911) nemalmultaj ĉinaj kaligrafoj kaj pentristoj, kiaj Ĝeng Banĉjaŭ (1693-1765), Ĵen Bonjan (1840-1896), U Ĉangŝuo (1844-1927) kaj Ĉji Bajŝi (1863-1957), donis al ventumiloj sian eminentan verkon de originala stilo. Ekz., sur iu ventumilo estas nur du ranoj pentritaj de Ĉji Bajŝi, kiuj fikse rigardas kvar ranidojn naĝantajn en akvo, tamen ili elspiras simplan plastikon kaj vivan etoson.


Ventumilo, kiel tradicia metiartaĵo de Ĉinio uzata por forpeli someran varmon, hodiaŭ estas ankoraŭ tre ŝatata de la popolo. □

* La aŭtoro estas vicesplorigisto de la Ĉina Arkeologia Instituto.


Faldebla ventumilo kun pentraĵo de Song-dinastio (960-1279)




Bambua ventumilo de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 25 p.K.), trovita en la 70-aj jaroj en la tombo n-ro 1 ĉe Maŭangduj. Ĉangŝa




Ventumiloj kun pentraĵo kaj kaligraĵo de Ming-dinastio (1368-1644)






Ventumilo de Ĉing-dinastio (1644-1911)



Ronda ventumilo kun pentraĵo de Song-dinastio (960-1279)






Ventumiloj el santala ligno kaj aliaj valoraj materialoj



Ventumilo kun pentraĵo de Lu Janŝaŭ

Ventumilo kun pentraĵo de Ĉji Bajŝi (1863-1957)



Ĉina tabloteniso hieraŭ kaj morgaŭ

En la 24-aj Olimpikoj en 1988 tabloteniso estos unuafoje ludata kiel oficiala sportbranĉo. Tiam diverslandaj getablotenisistoj intense konkursoj por la oraj medaloj de la viraj kaj virinaj solludoj kaj parludoj.

La ĉina tablotenisa teamo estos unu el la ĉefaj konkursantoj. En la 39-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso marte de 1987 ĝi gajnis 6 el la 7 ĉampionecoj. En la pasintaj pli ol 30 jaroj ĝi partoprenis 17 mondajn tablotenisajn ĉampionecajn konkursojn en kiuj ĝi gajnis 53 ĉampionecojn.

ĈINIO ENVICIĜIS INTER LA FORTAJ TEAMOJ DE LA MONDO

En la komenco de la 50-aj jaroj la ĉina tabloteniso estis ankoraŭ en sia infaneco. Antaŭ la fortaj teamoj, kiaj la hungara kaj japana, ĝi estis nur lernanto. Sed tiu lernanto progresis tre rapide kaj post nelonge surprizis la eminentajn tablotenisistojn, kiuj viglis sur la monda tereno multajn jarojn. Ĉinaj tablotenisistoj debutis en la 20-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso en 1953 kaj post 4-5 jaroj la ĉina teamo venkis la britan usonan kaj rumanan teamojn, kiuj estis kompare fortaj siatempe en la 24-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso.

En la 25-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso en 1959

la 22-jara ĉina sportisto Ĵong Gŭotŭan ekster ĉies atendo venkis plurajn eminentajn tablotenisistojn kaj gajnis la viran solludan ĉampionecon de la nomita konkurso. Lia venko markis, ke la ĉina tabloteniso eniris en novan etapon.

La unua ĉampioneco ege vigligis la ĉinajn sportistojn kaj kortuŝis multajn ordinarajn ĉinojn. Ĝuste tiam komenciĝis la tablotenisa fervoro tra Ĉinio.

La 26-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso okazis en 1961 en Pekino, la ĉefurbo de Ĉinio. Dank' al sia alta batalvolo kaj fulmorapida atako la ĉina teamo konsistanta el Ĵong Gŭotŭan, Ĝŭang Zedong, Ŝju Ĵinŝeng, Li Fuĵong, Ĉiŭ Ĝonghuj kaj aliaj novaj talentuloj venkis siajn rivalojn kaj gajnis la viran teaman, viran solludan kaj virinan solludan ĉampionecojn kaj virinan teaman kaj aliajn tri subĉampionecojn. La triumfo de la ĉinaj tablotenisistoj radikale ŝancelis la hegemonion de la japanaj sportistoj, kiuj venkis en la antaŭaj 6 mondaj ĉampionecaj konkursoj.

Post la nova venko de la ĉinaj tablotenisistoj aperis en Ĉinio tia fenomeno, ke viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj kun granda intereso interparolis pri tabloteniso kaj ludis ĝin. La tablotenisa fervoro tra la lando fariĝis ĉefa kaŭzo de la hegemonio de la ĉinaj tablotenisistoj super la mondo dum multaj jaroj.

Tiam ekzistis ankaŭ multaj ĉinoj kaj alilandanoj, kiuj opiniis, ke la kaŭzo de la ĉina venko kuŝas ĉefe en tio, ke la konkurso okazis en Pekino. Se ĝi okazus aliloke, la afero estus tute alia. Tial oni kompreneble turnis grandan atenton sur la 27-an Mondan Tablotenisan Ĉampionecan Konkurson okazontan en Prago, la ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio, por scii, ĉu la ĉina teamo vere atingis la mondan nivelon. Fine Ĉinio denove gajnis tri ĉampionecojn. La 28-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso okazis en 1965 en Jugoslavio, kie la ĉina teamo gajnis pli brilan venkon, kun 5 ĉampionecoj. Dank' al sia 10-jara peniga trejnado kaj intensa ludo la ĉina teamo ekhavis siajn apartan teknikon kaj konvenan taktikon kun rapida atako kiel ĝia kerno. La ĉina tabloteniso fine enviciĝis inter la fortaj teamoj de la mondo.

CELO ATAKATA DE ĈIUJ

La ĉina tabloteniso spertis multajn malfacilojn en sia disvolviĝo. En 1966 en Ĉinio komenciĝis la katastrofa kultura revolucio, pro kio la ĉina teamo ne partoprenis la 29-an kaj 30-an mondajn konkursojn. En 1971 la ĉina teamo aperis denove sur la monda tereno de tabloteniso: ĝi partoprenis la 31-an Mondan Tablotenisan Ĉampionecan Konkurson. Tiam la ĉina teamo aspektis tute nove: ĝiaj eminentaj tablotenisistoj, kiuj faris mul-

tajn meritojn, jam fariĝis trejnistoj kaj ilin anstataŭis elstaraj junaj debutantoj. Tiufoje la ĉinaj tablotenisistoj refoje mirigis la publikon per sia alta nivelo kaj aparta ludarto. Ili gajnis 4 ĉampionecojn.

La rapida progreso de la novaj ĉinaj sportistoj markis, ke la ĉina tabloteniso atingis sian maturan stadion kaj la tekniko kaj taktiko de la ĉinaj tablotenisistoj troviĝas en la supera pozicio de la mondo. Kaj sinsekvo da venkoj de la ĉina teamo faris ĝin ĉefa celo atakata de la fortaj teamoj de la mondo kaj ĉi tiuj unu post alia prenis la ĉinajn sportistojn kiel imagajn rivalojn en la trejnado.

La penado de la fortaj teamoj de aliaj landoj efikis en la 32-a monda konkurso en 1973. Kvankam plenenergie ludis la ĉina teamo, tamen en la finalo ĝia vira teamo estis venkita de la sveda teamo kaj ĝia virina teamo gajnis nur subĉampionecon, kaj la ĉina teamo gajnis nur tri individuajn ĉampionecojn. En la 33-a monda konkurso, kiu okazis 2 jarojn poste, la ĉina te-

amo gajnis la viran kaj virinan teamajn ĉampionecojn, tamen neniu solludan aŭ parludan ĉampionecon. Poste en la 34-a monda konkurso la ĉina teamo ne gajnis la viran kaj virinan solludajn ĉampionecojn kaj en la 35-a monda konkurso la ĉina vira teamo perdis la teaman konkurson kun la hungara teamo, fortulo de Eŭropo.

La 38-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso okazis en 1985 en Svedio. Svedoj esperis venki la ĉinan teamon, profitante la kondiĉojn favorajn al ili. En la preparado ili invitis por kulturejo alilandajn tablotenisistojn, kies ludarto similas al tiu de la ĉinaj sportistoj. Antaŭvespere de la konkurso ili speciale petis japanajn kaj sudkoreajn tablotenisistojn ludi kun ili por pluapaŝe koni la teknikon de la aziaj tablotenisistoj.

La sudkorea teamo estis unu el la fortaj teamoj, kiuj ĵuris venki la ĉinan. Ĝi plene analizis kaj studis la rapidan atakon kaj taktikon de la ĉinaj tablotenisistoj unuflanke kaj atente lernis de la eŭropaj sportistoj la

altnivelan pilkologion aliflanke por kombini la rapidan atakon kun la pilkoturniĝo kaj atakon de la proksima duontablo kun tiu de la meza kaj malproksima duontablo kaj krei novan teknikon, kio rapide levis la nivelon de la sudkorea teamo. En la monda konkurso ne nur ĝia virina teamo venkis, sed ankaŭ ĝia vira teamo multe minacis la ĉinajn rivalojn. En la 10-a Azia Sportkunveno okazinta en Seulo en 1986, ĝia vira teamo fine venkis la ĉinan kaj gajnis la ĉampionecon de tiu sportkunveno.

KASITA KRIZO

Antaŭ la 50-aj jaroj la tablotenisistoj de Hungario kaj aliaj eŭropaj landoj hegemoniis super la monda tablotenisa tereno per sia stabila pilkotranĉado. Komence de la 50-aj jaroj la japanaj sportistoj kreis novan teknikon de aktiva atako kun pilkologio kiel la kerno kaj prenis la hegemonian pozicion de la eŭropaj sportistoj. En la 60-aj jaroj la ĉina teamo enkondukis rapidan atakon en la mondan tablotenison kaj frakasis la

Tablotenisa konkurso aranĝita de la Ĝjangsu-a Petrola Kompanio





Ĉina tablotenisistino Ĝjaŭ Ĝimin en azia sportkunveno



La monda tablotenisa ĉampiono Ĝjang Ĝjaljang

hegemonion de la japana teamo. Ekde la komenco de la 70-aj jaroj ĉiulandaj sportistoj penis akiri novajn teknikajn atingojn. La svedaj kaj sudkoreaj tablotenisistoj kombinis la pilkopoligon kun rapida atako kaj montris sian potencon en la proksima, meza kaj malproksima duontablo kaj dorsmana bato. Tio montris la tendencon de disvolviĝo de la nova tekniko de la nuna tabloteniso de la mondo.

Defiate de multaj fortaj teamoj, la ĉina teamo faras ĉion eblan por perfektigi sian rapidan atakon unuflanke kaj kulturi siajn ludistojn lertajn en pilkopoligo aliflanke kaj samtempe senĉese studis pri kombino de lopigo kun rapida atako. Ĝeneral-dire, Ĉinio ankoraŭ havas iom da supereco, kion atestis 6 ĉampionecoj gajnitaj de Ĉinio en la 39-a monda konkurso, tamen konkrete analizate, tia supereco estis nerimarkinda. En la konkurso la ludarto de multaj ĉinaj sportistoj estis monotona, al ili mankis ŝanĝo de artifiko. Ili ne povis elvolvi sian rapidan atakon kaj montris malfortecon de la dorsmana bato. En multaj okazoj la ĉinaj tablotenisistoj venkis la rivalojn nur dank' al sia bona fundamenta ludarto kaj anim-stabileco, dum la rivaloj sin montris tre viglaj kaj lertaj en atako kaj taktikoŝanĝo.


Krome, apenaŭ sentebblas la granda fervoro vekita ĉe la ĉinoj de Ĵong Ĝŭotŭan, kiu gajnis por sia lando la unuan mondĉampionecon en 1959. Ne plu furoras tabloteniso en la okuloj de la ordinaraj ĉinoj. De la 70-aj ja-

roj multaj opinias, ke Ĉinio estas senegala en tabloteniso kaj al ĝi nepre apartenas la mondĉampionecoj. Ĝuste pro tio en la ĉina socio eĉ ne sensaciis la 7 mondĉampionecoj gajnitaj de la ĉinaj tablotenisistoj en la 36-a monda konkurso en 1981.

Konsekvence tabloteniso ne plu interesis homojn. Eĉ ne estis tre altira la ludo de mondĉampionoj. De la komenco de la 70-aj jaroj pli kaj pli malmultaj gejunuloj ludas tablotenison. En iuj regionoj oni eĉ nuligis tablotenisajn kursojn en postlecionaj sportlernejoj, destinitaj por treni junajn talentulojn. Fine de la 70-aj jaroj leviĝis la ĉina virina flugpilkado en la mondo kaj oni turnis sian intereson sur la virinan flugpilkon, dum tabloteniso malleviĝis plej malalten en la okuloj de la ĉinoj.

La sinsekvaj venkoj spirite katenis la ĉinajn tablotenisistojn, kiuj sentis sin fortaj kaj superaj. Plejparto de la trejnistoj kaj sportistoj estis kaptita de la penso, ke la ĉina tabloteniso estas senegala en la mondo. Sekve de tio iom post iom mal-

(Daŭrigo sur p. 45)



“Eĉ unu tagon mi ne vane pasigos.”



Ilustraĵo de LI SIGJI

En Ĉinio estis pentristo, kiu, kvankam pli-ol-90-jara, ĉiutage faris minimume 5 pentraĵojn. Li diris: “Eĉ unu tagon mi ne vane pasigos.” Li skribis la vortojn sur papero kaj pendigis ĝin sur muro por sin averti. Li estis neniu alia ol la fama ĉina pentristo Ĉji Bajŝi.

Venis lia naskiĝtago. De la mateno ĝis la vespero lin vizitis liaj lernantoj kaj amikoj unuj post aliaj. Li afable akceptis la

gastojn. Kiam li adiaŭis la lastajn gastojn, jam estis profunda nokto. Li sentis lacon kaj enlitiĝis.

En la sekva tago li leviĝis tre frue kaj tuj iris en la pentroĉambron. Li sternis paperon, prenis penikon kaj faris pentraĵojn unu post alia. Oni vokis lin: “Bonvolu preni la manĝon!”

“Momenton!” li respondis kaj ne ĉesis labori.

Li faris 5 pentraĵojn kaj tiel plenumis la taskon, kiun li difinis por si mem. Post la manĝo li daŭrigis la pentradon. La familianoj timis, ke li malsaniĝos pro troa laco, kaj admonis: “Vi jam faris 5 pentraĵojn, ĉu ne? Kial vi ankoraŭ pentras?”

“Hieraŭ estis mia naskiĝtago, mi ne pentris pro multeco de gastoj,” li klarigis. “Hodiaŭ mi devas fari pli da pentraĵoj por kompenso.” Tion dirinte, li plu pentris diligente. □

Neenuiga ludo

Antaŭlonge estis reĝo, kiu havis multajn amuzilojn. Tamen ajna amuzilo enuigis lin post kelkaj tagoj. La reĝo deziris amuzilon neenuigan por li. Li diris: “Kiu elpensos tian amuzilon, ricevos grandan rekompencan.”

Jen iu saĝulo donacis ŝakon al la reĝo. Sur ŝaktabulo troviĝas 64 egalaj kvadratoj. La ŝakpecoj estas nomataj “reĝo”, “damo”, “turo”, “ĉevalo”... Ŝakludantoj movas ŝakpecojn laŭ la reguloj, simile al batalo unu kontraŭ la alia. La ludo estas tre interesa. La reĝo neniam enuis de ŝakludo. Li venigis la saĝulon kaj ĝoje diris:

“La amuzilo vere estas neenuiga. Mi multe rekompencos vin per tio, kion vi deziras.”

“Mi petas de vi nur iom da tritikgrajnoj,” diris la saĝulo.

“Kio? Tritikgrajnoj?” miris la reĝo. “Kiom vi volas?”

“Mi petas tiom, ke oni metu 1 en la 1-an kvadraton sur la ŝaktabulo, 2 en la 2-an, 4 en la 3-an... en ĉiu sekva kvadrato la nombro duobliĝu kompare kun tiu en la antaŭa. Tiom da tritikgrajnoj jam kontentigos min,” diris la saĝulo.

“Bone, tio estas nur mizera kvanto. Tiom mi donos al vi,” ridis la reĝo.

La reĝo ordonis, ke la ministro pri greno metu tritikgrajnojn sur la ŝaktabulon laŭ la ĉiam duobliĝanta kvanto 1, 2, 4, 8, 16... Baldaŭ li elĉerpis sakon da tritiko kaj tuj raportis al la reĝo:

“Terure, terure!”

“Kio konsternis vin?” demandis la reĝo.

“Ne sufiĉos eĉ la tuta greno de la lando, se ni kontentigos la postulon de la saĝulo!” diris la ministro.

Aŭdinte tion, la reĝo ektimis kaj povis fari nenion alian ol nuligi sian promeson. □

Motorcikla konkurso de kamparanoj

Fotoj de ĜANG TJEĜOU

Antaŭ "ek"



Intensa konkurso





Starto

Bondeziro de amikoj





Junaj geedzoj



Fruprintempe mi rigardis en Lingbaŭ-gubernio de Henan-provinco motorciklan konkurson de kamparanoj. Ĉe la startlinio kolektiĝis pli ol mil diverstipaj motorcikloj, kaj la konkursantoj plejparte estis junaj kamparanoj, tamen inter ili troviĝis ankaŭ mezaĝuloj kaj virinoj. Ili venis el 16 vilaĝoj de la gubernio. Ili startis grupo post grupo kaj konkuris intense sur ŝoseo 20 kilometrojn longa.

En la pasinteco la kamparanoj de la gubernio vivis ne riĉe. En la lastaj jaroj, dank' al la disvolvo de diversaj okupoj en la kamparo, rapide progresis la ekonomio kaj multe boniĝis la vivo de la kamparanoj. Ili aĉetis motorciklojn por transportado en sia mastrumado, kaj nun en la gubernio estas pli ol 4 500 motorcikloj. En la tempo de malmultaj kamplaboroj, iuj junaj kamparanoj iniciatis la grandan konkurson de motorciklado.

Grandan sukceson al vi!



Kultura ruino de 5000 jaroj

Teksto de CAŬ BAJLONG

Fotoj de GŬO DAŠUN





Statuo de gravedulino

*Jada drako elterigita en Sanŝingtala
de la Aŭtonoma Regiono de Interna
Mongolio*



Kapo de diino n-ro 1



Jada porkosimila drako

Maje de 1979 oni malkovris grandan altaron, konstruitan antaŭ ĉ. 5 000 jaroj, en la okcidenta montregiono de Ljaŭning-provinco, nordorienta Ĉinio. En 1983-1985 oni malkovris diinan templon kaj kelkajn ŝtonajn tombejojn en la vilaĝo Niŭheljang. Ĉinaj arkeologoj opiniis, ke antaŭ 5 000 jaroj tie estis loko de la antikvuloj de Hongŝan-kulturo.

Hongŝan-kulturo estis primitiva kulturo de neolitiko en la norda parto de Ĉinio. Ĝi dislokiĝis en vasta regiono de la baseno de Ljaŭhe-rivero en la oriento ĝis sude kaj norde de Janŝan-monto en la okcidento. Ĝi estis kreita de granda tribo-grupo kaj unuafoje malkovrita malantaŭ la monto Hongŝan en la antaŭurbo de Ĉifeng, Interna Mongolio, en 1935. Pro tio ĝi ricevis la nomon.

Hongŝan-kulturo karakteriĝas per ruĝaj argilaĵoj kun nigraj desegnaĵoj, grandaj frapformitaj ŝtonaj agrokulturiloj kaj delikataj ŝtonaj instrumentoj por tranĉi kaj skrapii. Ĉinaj arkeologoj plejparte opiniis, ke Hongŝan-kulturo evoluis sub la influo de Jangŝaŭ-kulturo* en la baseno de la Flava Rivero. Post elterigo de granda nombro da jadaĵoj en Fuŝin-gubernio, Ljaŭning-provinco en la 70-aj jaroj, oni devas fari retakson al Jangŝaŭ-kulturo. Ĉar tiuj jadaĵoj plejparte estis plastike versimilaj figuroj de apro, tigro, testudo, fiŝo, birdo, cikado k. a., kiuj antaŭe ne videblis en Jangŝaŭ-kulturo. El la elterigitaj objektoj granda drakforma jadaĵo estas la plej frue trovita en Ĉinio ĝis nun, kio mirigis la arkeologajn rondojn de Ĉinio. Drako ne nur estis alte diigita adoraĵo en la antikva ĉina kulturo, sed ankaŭ ĉiam rigardata kiel neprofanebla

sankta enkorpiĝaĵo de imperiestro en la feŭda socio. La drako aperinta en Hongŝan-kulturo montris, ke en la tiea primitiva socio oni iam prenis drakon kiel totemon.


En la 80-aj jaroj ruino de la Hongŝan-aj antikvuloj por kulti la prapatrojn estis prifosita ĉe Dongŝanzuj de Kezŭo-gubernio, Ljaŭning-provinco. Ĝi estis grupo da konstruaĵoj el grandaj ŝtonoj. Ĝi estis ronda en la sudo kaj kvadrata en la nordo, kun simetriaj aloj. Inter la skulptitaj argilaj homfiguroj elterigitaj ĉe la ronda altaro estis piedstara nuda statuo de antikva virino, unuafoje trovita en Ĉinio. Ĝi, 5.8 cm. alta, kun elstara abdomeno, karnodika pugo kaj graseta brusto, havas okulfrapajn trajtojn de gravedulino. En la ruinoj de paleolitiko kaj la malfrua kaj frua bronzepoko en diversaj mondpartoj estis trovitaj ankaŭ ŝtonaj aŭ argilaj statuoj kun evidentaj trajtoj de virino. Ili ĝenerale estas rigardataj kiel simbolo de matriarkeco

kaj rektaj atestoj por difini la matriarkan socion. En la arkeologia prifosado al neolitikaj ruinoj en Ĉinio, oni trovis sinsekve similajn materialojn, ekz., kolora argila botelo de Jangŝaŭ-kulturo kun aperturo en formo de virina kapo trovita en Dadiŭan de Ĉin'an-gubernio, Gansu-provinco kaj kolora argila botelo kun gravurita virina figuro elterigita ĉe Sanpingtaj en Ĉinghaj-provinco. Tia nuda virina statuo tamen estis unuafoje trovita en la ruinoj de la neolitika kulturo de Ĉinio.

La ruino situas meze de monte ĝo kontraŭ la rivero Daling kaj la transriveraj monto kaj montpasejo kaj rigardas al la sudorienta ebenaĵo. La antikvuloj antaŭ 5 000 jaroj elektis tiun geografian medion por konstrui tiun ŝtonan konstruaĵaron kun bona aranĝado. Ili evidente rigardis la lokon kiel sanktejon. Iuj fakuloj opinias, ke tiu nuda statuo de tipa gravedulino kredeble estis la "diino de naskado" aŭ "diino de terkulturo"

La ruino de la diina templo





Prof. Su Bingcǐ, la prezidanto de la Ĉina Arkeologia Asocio, esploras elterigitajn objektojn.

Kolora fajencaĵo

adorata de la tiamaj homoj. La ruino de la kvadrata konstruaĵo, sen tegmento kaj kolona bazo kaj kun ŝtono en la mezo, kredble estis terasa altaro. Ĝi estis la plej frua religia restaĵo, kiun oni konas en Ĉinio. La prilaborado de la konstruaj materialoj kaj la konstrua tekniko jam atingis relative altan nivelon. La konstruaĵoj, simetrie dislokitaj laŭ la suda kaj norda aksoj kaj kun la centra kaj flankaj konstruoj, havas evidentajn popularajn trajtojn de la ĉina arkitekturo.

Alia ruino de Niŭheljang-kulturo konsistas el ruino de diina templo sur la montosupro kaj grupoj da ŝtonaj tomboj sur la ses montpintoj.

Ĉe la supra tavolo de la ruino de la diina templo oni malkovris ses skulptaĵojn de homkorpaj partoj en malsamaj grandecoj, la plej malgranda el ili estas en grandeco de homo. La grandaj nazo kaj oreloj elterigitaj en la ĉefa ĉambro eĉ estas trioble pli grandaj ol tiuj de homoj. Precipe unu kapa statuo de diino estas multe valora. Ĝiaj vizaĝo, oreloj, okuloj, buŝo kaj nazo es-

tis precize skulptitaj. Ĝia vizaĝo estas simila al tiu de la nunaj homoj de norda Ĉinio. Ĝi estas tipe mongola. La kapo estis farita per tradicia ĉina skulpturo, el kiu evidente vidiĝas kuraĝa troigo surbaze de realismo kaj impresis move. La brilaj okulgloboj de la diino estis inkrustitaj per kristale bluverdaj jadglobetoj en la okuloj. Oni elterigis ankaŭ grandan nombron da skulptaj pecoj, kiaj homaj brakoj, manoj, nazo, oreloj kaj mamoj, apro, drako, kaj birdoj, kaj konstruajn pecojn, lerte fari-tajn en diversaj formoj.

Analizinte la fenomenon, ke la granda grupo da diinoj elterigitaj en Niŭheljang lokiĝis ĉirkaŭ la ĉefa diino. Oni asertis, ke tiam oni adoris ĉefe siajn prapatrojn. Tio montris, ke oni jam forlasis adoradon al la naturo kaj totemo en la primitiva religio, transpasis la malaltan stadion adori animon de la mortintaj prapatroj kaj eniris pli altan stadion adori idolojn de la prapatroj.

Oni trovis nombron da malgrandaj tomboj ĉirkaŭ la ŝtonaj

tomboj de la diina templo, kaj elteriĝis el iuj tomboj malmulte da objektoj, kiaj Ŭ-formaj jadaĵoj, nubformaj jadaĵoj, jadaĵoj kaj drakoj. Tio montris, ke la membroj de klano jam dividiĝis en malsamajn rangojn. Grandaj tomboj ĝenerale troviĝis en la centro de la tombejo, ili formis montpintojn el ŝtonoj kaj tero. Tio simbolas nesupereblan potencon de la mastro de tombo.

En la ruino de Hongŝan-kulturo oni trovis restaĵojn de altaro, templo, diinaj statuoj, ŝtonaj tomboj k.a. Tio montris, ke la antaŭhistoria kulturo en la baseno de Ljaŭhe-rivero en norda Ĉinio jam atingis relative altan nivelon, kio liveris novan materialon por esplori la originon de la ĉina civilizacio. □

** Jangŝaŭ-kulturo, unu el la neolitikaj kulturoj de Ĉinio; antaŭ 5-6 mil jaroj, estis unuafoje malkovrita ĉe Jangŝaŭ-vilaĝo de Mjanĉi-gubernio, Henan-provinco. Ĝi dislokiĝis en la meza kaj malsupra partoj de la Flava Rivero. El ĝiaj restaĵoj ofte troviĝis koloraj argilaĵoj, tial ĝi estis ankaŭ nomata kolor-argilaĵa kulturo.*

Koresponda konsultiĝo pri longviveco

Maltrankvilega patrino petis helpon de iu speciala hospitalo por sia malsana filo:

“... Mia filo estas malforta kaj suferas de grava anemio, edemo... Se mi povus resanigi mian filon per mia vivo, mi preferus tiel fari... Hodiaŭ mi informiĝis, ke la Orienta Longviveco-konsultiĝa Hospitalo engaĝis famajn kuracistojn en la korespondan diagnozon al la pacientoj, tial kun larmoj mi skribas al vi ĉi-nokte kaj ĝojas, ke mia filo estos savebla...”

Tiu hospitalo skribis sinceran respondon al la patrino: “... Ricevinte vian leteron, ni sciiĝis, ke via tri-jara filo suferas renan sindromon... Ni bone komprenas vian maltrankvilegon. Por pli frue resanigi vian filon kaj mildigi vian ĉagrenon, antaŭ ol ricevi vian kurackotizon ni jam hastis peti koncernajn fakulojn fari diagnozon pri la malsano de via filo...”

Tio estis speciala servo al la pacientoj farita de la Orienta Longviveco-konsultiĝa Hospitalo fondita en Hangĝoŭ en la lasta julio, en koresponda maniero. Ĝi estas la unua tiuspeca hospitalo de Ĉinio.

En la komenco de la kuranta jaro, kiam mi restis en Hangĝoŭ, kun granda intereso mi vizitis tiun faman hospitalon.

“Mi estas altstatura, en eŭropa vesto kaj kun kravato. Ha,


ha!” En telefono sin prezentis al mi s-ro Lin Bin, la estro kaj ĉefa fondinto de la hospitalo, por ke mi povu facile ekkoni lin en la sekvanta tago. Lia serena kaj entuziasma rido estis tiom ĉarma, ke mi volis lin vidi tre baldaŭ.

Duatage, mi vere ekkonis lin je la unua vido de malproksime, salutis lin kiel malnovan amikon

kaj sekvis lin en kabineton de la hospitalo.

La kabineto konsistas el nur du ĉambroj kaj ĝia trairejo servas kiel la oficĉambro de la estro de la hospitalo. En la ekstera ĉambro kelke da junulinoj klasifikis leterojn de malsanuloj por sendi ilin al koncernaj fakuloj kaj famaj kuracistoj. Oni

Interparolo de la rektoro de la Ĝeĝjang-a Medicina Universitato (maldekstre) kaj kuracisto pri konsultiĝa aktivado





Diagnozo



Traktado de leteroj de malsanuloj

diris al mi, ke eĉ tiu kabineto estas luprenita.

Apenaŭ mi sidiĝis, s-ro Lin Bin komencis senĝene prezenti al mi la hospitalon.

Kun la senĉesa altiĝo de la viv-nivelo, leviĝis ankaŭ la sana nivelo kaj meznombra vivdaŭro de la ĉinoj. Oni esperas vivi pli sane kaj pli longe kaj ĝustatem-

pe ricevi diagnozon kaj kuracon, kiam ili suferas malsanon. Sed, en la nuna Ĉinio la disvolviĝo de la medicina, farmacia kaj higiena afero ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon por la popolo preventi kaj kuraci malsanojn. En multaj regionoj, precipe en foraj kaj montaj regionoj, estas malfacile por la pacientoj

viziti kuracistojn, precipe famajn kuracistojn en urbegoj. Pri tio s-ro Lin Bin havis tre profundan konon, ĉar li laboris multajn jarojn en montvilaĝoj, depost kiam li diplomitiĝis el ĉinmedicina kolegio fine de la sesdekaj jaroj. La Orienta Longviveco-konsultiĝa Hospitalo ja celis solvi tiun malfacilon.

Subtenate de la Konsultiĝa Centro de Scienco kaj Tekniko de Ĝeĝjang-provinco kaj Ĝeĝjang-a Medicina Universitato, naskiĝis en Hangĝoŭ la unua koresponda hospitalo en Ĉinio, kiu servas por la ordinaraj pacientoj.

S-ro Lin Bin rakontis al mi ankaŭ la strukturon kaj servon de sia hospitalo. Nun, la hospitalo engaĝis 103 specialajn konsultatojn kaj 60 famajn kuracistojn tra Ĉinio, el kiuj multaj estas emeritaj specialistoj kaj profesoroj. La hospitalo konsistas el pli ol 20 fakoj, kiaj tiuj de kardiovaskula afekcio, nutrokanala malsano, maljunula medicino, ginekologio-obstetriko kaj ĉina medicino. Ĝi laboras ĉefe por fari diagnozojn kaj preskribi medikamentojn al la pacientoj, kiuj suferas kronikan malsanon kun komplikaj simptomoj. Post kiam la konsultiĝa hospitalo ricevas kuracajn registrojn kaj analizajn donitaĵojn pri malsanuloj, ĝi sendas ilin, post klasifiko de la kabineto, al famaj kuracistoj de koncernaj fakoj, por ke la lastaj analizu la malsanojn, faru diagnozojn, ellaboru terapiajn projektojn kaj respondu ĉiajn demandojn al pacientoj. Subskribinte la kuracajn raportojn post kuna diagnozo, la fakuloj do resendas ilin al la pacientoj. Se necese, la hospitalo venigas al si pacientojn por ilin kuraci.

La fondiĝo de la Orienta Longviveco-konsultiĝa Hospitalo

vekis varman eĥon de ĉiuj lokoj. Depost la lasta aŭgusto la hospitalo preskaŭ ĉiutage ricevis kelkdek, foje eĉ cent leterojn. Ĝis nun, la hospitalo jam faris ĉ. dekmil respondojn al malsanuloj de 21 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj per kuna diagnozo solvis pli ol 1 000 malfacilajn kazojn.

Tion dirinte, ĝoje ridegis s-ro Lin Bin en nigrakadraj miopaj okulvitroj, kiu sentas grandan fieron pro sia entrepreno. Antaŭ la fondiĝo de la hospitalo, 44-jara Lin Bin plenumis 8 fakajn verkojn kun pli ol du milionoj da ĉinaj ideografiaĵoj. Krome, li ankaŭ publikigis 36 disertaĵojn kaj pli ol 300 aliajn artikolojn. Tamen, tiu talentulo nun ne povas ne ĉesigi sian verkadon por okupiĝi pri administraj laboroj. Tamen, li ne bedaŭras tion, sed firme kredas sian nunan aferon ekstreme grava.

En la oficĉambro de la hospitalo, mi legis kelkajn le-

rojn kaj konis kuracajn kazojn solvitajn de la hospitalo.

En Ŝangju-gubernio de Ĝeĝjang-provinco estas virino, kiu ne gravediĝis 5 jarojn post sia edziniĝo. Post la diagnozo la lokaj kuracistoj misopiniis, ke ŝi suferas uteran tumoron kancerigeblan, kio multe ĉagrenis tiun virinon. Poste, la Orienta Longviveco-konsultiĝa Hospitalo invitis ginekologojn por fari kuran diagnozon kaj eĉ venigis ŝin al Hangĝoŭ por doni al ŝi kuracon. Fine, la fakuloj venis al la konkludo, ke ŝi suferas uteran muskolan tumoron kaj simltanan apendiciton. Nun ŝi estas resanigita de la hospitalo kaj gravediĝis.

Plejparto de la geologoj, longtempe laborantaj sur kampoj, suferas stomakan malsanon. Tiu hospitalo faris efikan terapion en kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinoj, por resanigi ilin. Nun, tiu hospitalo jam starigis konstantan servorilaton

kun iuj geologoj kaj akurate donas al ili kuracan servon.

La supre menciita patrino refoje skribis al la hospitalo pli ol du monatojn poste: "...Post la kuna diagnozo kaj kuracado de la fakuloj de via hospitalo, la malsano de mia filo jam mildiĝis. Kiam mi portis lin al via hospitalo, li eĉ ne povis stariĝi pro malforteco. Post la dumonata kuracado li jam povas fari paŝojn..."

Tiu malgranda konsultiĝa hospitalo kun nur kelkdek kvadrataj metroj nekredeble ludas sian rolon kaj tiras al si la koron de miloj da malsanuloj. Je la adiaŭo, s-ro Lin Bin ambicie diris, ke laŭ lia plano oni fondos filiojn de la konsultiĝa hospitalo en iuj lokoj kaj la respondecaj kuracistoj estos komisiitaj skribi la diagnozon pri malsano por levi la kvaliton de la kuna diagnozo kaj la kuracan nivelon de la filioj. Unuvorte, li decidis daŭre fari tiun aferon. □

(Daŭrigo de p. 35)

fortiĝis la volo krei novon, kun kiu la ĉina tablotenisisto iam rapide levis sian nivelon, kaj la trejnado estis rutina kaj la tekniko progresis malrapide. Nemalmultaj sportistoj estas regataj de la kontraŭdira psiko: ili kaj tro fidis sian kapablon kaj tre timas malvenkon. Ĉio ĉi montris, ke la ĉina tablotenisisto alfrontas kaŝitan krizon.

POR VENKI LA KRIZON KAJ IRI AL LA OLIMPIKOJ

La malvenko de la ĉinaj tablotenisistoj en la 10-a Azia Sportkunveno sendube alarmis la ĉi-

najn sportistojn. Ĝi avertas, ke sen sufiĉa atento al la tablotenisisto, sen vasta socia zorgo, sen ĝenerala amasa fervoro kiel socia bazo de tablotenisisto, la krizo minacanta la ĉinan tablotenisiston frue aŭ malfrue realiĝos kaj la ĉina tablotenisista teamo ne certe atingos brilajn sukcesojn en la venontaj Olimpikoj. Ĝuste pro tio la publika opinio alvokas lastatempe, ke oni donu pli da atento al tablotenisisto. La tablotenisista rondo de Ĉinio klare montris, ke ĝi transformos la trejnadon en koncepto kaj agmaniero kaj serĉos rimedon por fari teknikan impeton. Post la 39-a

Monda Tablotenisista Ĉampioneca Konkurso oni turnis sian atenton denove sur tablotenisiston kaj videblas pli kaj pli multaj, kiuj aĉetas pilkojn kaj batilojn por tablotenisisto, kaj surstrate iaforte vidiĝas geknaboj, kiuj per batilo en la mano faras gestojn de pilko-frapo, kaj oni refunkciigas trejnajn kursojn de tablotenisisto en nemalmultaj postlecionaj sportlernejoj kaj okazigas tabletenisajn konkursojn de diversaj niveloj. Kompreneble estas ankoraŭ frue diri, ke en Ĉinio leviĝos denove fervoro por tablotenisisto, tamen ne estas troiga diri, ke tio estas bona aŭguro. □

De Serŝju al Kangding

Teksto de GE ŜI Fotoj de CAJ HAJFENG

Ĝimenda en Juŝu-subprovinco de Ĉinghaj estas kunfluejo de Tongtjan- kaj Ĝinŝa-riveroj, branĉoj de Jangzi. La parto de la loko ĝis la urbo Jibin nomiĝas Ĝinŝa-rivero pro sia ora sablo, kiu longas je 2 308 km. kaj situas inter la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo kaj Siĉŭan-baseno, kun niveldiferenco de pli ol 3 000 m. Ĝi estas la plej danĝera parto de Jangzi-rivero. Iuj membroj de la ĉinaj kaj alilandaj ekspedicioj oferis sian vivon en 1986 preskaŭ en tiu sama parto.

Forlasinte Juŝu de Ĉinghaj, ni eniris, laŭ la norda bordo de Jangzi-rivero, Serŝju-gubernion de la Garze-a Tibet-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Siĉŭan.

VOJOJ MALFACILAJ EN SIĈŬAN

Serŝju-gubernio, 4 201 m. super la marnivelo, limtuŝanta


Juŝu, situas sude de Bajankaromontaro. Ĉirkaŭe de ĝi sterniĝas altmonta stepo sen arbo. La tiea pejzaĝo preskaŭ tute similas al tiu de Juŝu. La lokanoj okupiĝas ĉefe pri brutobredado. La tibetanaj paŝtistoj konsistigas 97.5% de ĝia loĝantaro. La gastejo de la gubernia registaro regalis nin per tipaj Siĉŭanaj pladoj kun originala gusto. La tibetanaj kadroj, kiuj akceptis nin, parolis la ĉinan komunan parollingvon miksitajn kun la Siĉŭana dialekto.

Garze estas abunda je altaj montoj kaj ravinoj, tie staras ĉ. 40 montpintoj kun alto de pli ol 6 000 m. super la marnivelo, tutjare kovritaj de neĝo. La topografio estas nordokcidente alta kaj sudoriente malalta, la grandaj riveroj Ĝinŝa, Jalong kaj Dadu kun altaj montoj ambaŭflanke torentas suden. De la riverujo ĝis la montsupro la alte-

co ĝenerale estas 1 000 ĝis 3 000 m., maksimume pli ol 6 000 m. Tio faras la altajn montojn kaj ravinojn de la subprovinco Garze originale majestaj.

Tia topografio malfaciligas la trafikon. Kvankam Garze de antikve estas la ĉefa vojo al Tibeto, tamen ĝia ekonomio ĝis nun ankoraŭ restas tre postĝinta. Tion kaŭzis certgrade la malfacilaj vojoj. Granda antikva ĉina poeto Li Baj plendis, ke la tiea vojo malfacilas, kiel aliro al la ĉielo. Ĉi-foje ni ja tion spertis.

De Serŝju orienten, nia aŭto stumble rampis laŭ la ŝoseo sur la kruta monto. Supre estis neĝkovritaj montsuproj, malsupre la rivero aspektis kiel linio. Kelkiam ni vidis bovojn kaj ŝafojn paŝtiĝantaj sur la monto. Sed tiu poezia pejzaĝo estis ĉiam rompita de la balanciĝanta aŭto. Nia aŭto veturis sur tia ŝoseo kaj nia koro pendis en la aero, tial neniu el ni kuraĝis dormeti. En iuj lokoj jen la ĉielo nubigis, jen la suno brilis, ofte pluvis kaj neĝis. La lokanoj diris, ke "la kvar sezonoj estas sur unu monto kaj la vetero malsamas en inter-spaco de 5 kvadrataj km." Neĝegis sur la monto, dum pluegis ĉe la piedo. Tio vere larĝigis nian vidkampon. Pro pluego iam kaj iam okazis terfaloj sur la ŝoseo. Nia aŭto ofte estis barita duonvoje, tiam ni povis vidi, ke ŝoseaj konstruantoj, ligitaj per ŝnuro, ĉe monttallo forigas danĝerajn ŝtonojn por trabati la ŝoseon. Iam ni eĉ devis, surdorse portante kelkdek kg. da pakaĵo, piediri plurajn km. kaj





Fakuloj de la Sutro-presejo de Dege en korektado de sutroj

veturi per alia aŭto interŝanĝe kun la pasaĝeroj trans la terfala loko. Se terfalo okazis en loko senhoma, ni do devis suferi malsaton kaj atendi la ŝosean ripariĝon.

En la vojaĝo, plej profunde impresis nin la montoj kun neĝkovritaj pintoj unu post alia. Tie la neĝkovritaj montoj estis multe diferencaj de tiuj en Ĉinghaj. Ili evidente estis erozigitaj, krutaj, danĝeraj, figure klaraj. Precipe tiam, kiam la suno subiris, la sunradiaj koloj falis sur la neĝkovritajn montojn kaj vidiĝis sorĉa belo de la suno, tiam oni povis kompreni, kial literaturistoj figuras la viron per monto.

Veturinte orienten pli ol 300 km. kaj transpasinte Bula-monton, ni venis al duon-agrikultura kaj duon-paŝta regiono, kie prosperas grandaj parceloj da pinoj kaj piceoj. Tie la tibetanoj plejparte ne loĝas en tendoj, sed en domoj. La ebentegmentaj kaj kvadrataj domoj du- aŭ tri-etaĝaj el tero (ŝtonoj) aŭ ligno aspektas kiel fortikaĵoj. La tere- taĝo servas kiel stalo kaj la supra etaĝo kiel loĝejo, la tegmento servas kiel draŝejo, kaj en ĉiu etaĝo estas segil-denta ŝtuparo el vertikale duonigita trunko.

Mi ne faris esploradon, sed mi opiniis, ke tia konstruaĵo kun funkcioj de produktado, vivado kaj militado certe estis kreaĵo de primitiva klana tribo.

HISTORIAJ VIDINDEJOJ

Garze-subprovinco havas longan historion. Oni trovis tie paleoantropajn kraniojn kaj kulturajn ruinojn de paleolitiko kaj neolitiko. Tie vivas tibetanoj, han-oj, ji-oj, huj-oj, ĉjang-oj kaj naŝi-oj. Dege en la subprovinco, Lhasa de Tibeto kaj Ŝjahe en la suda Gansu-provinco estas la tri centroj de la antikva kulturo de la tibeta nacieco.

La Sutro-presejo de Dege apud Ĝinŝa-rivero, kiel "trezorejo ĉe la piedo de neĝmonto", konstruiĝis en 1729. En ĝi konserviĝas pli ol 217 000 lignaj presplatoj kaj platoj por presi pentraĵon. La presplatoj dividiĝas en tri kategoriojn: budhismaj sutroj kaj prisutraj verkoj, fruaj medicinaj verkoj de la tibeta nacieco kaj plenaj kolektoj, historiaj, biografiaj, astronomiaj, kalendaraj, matematikaj, literaturaj kaj artaj verkoj de famaj tibet-naciecaj erudiciuloj. "La origino de Hinda Budhismo" konservata en ĝi estas rara libro. Tiuj raraj presplatoj ha-

vas gravan sciencan valoron por esplori la historion de la tibeta nacieco, ĝiajn religian historion, literaturon, arton, medicinon kaj farmakologion.

Alia fama antikva restaĵo en la subprovinco estas la ferĉena ponto super Dadu-rivero okcidente de la gubernia urbo Luding. La rivero torentas de nordo suden preter Luding. Ambaŭborde de ĝi staras krutaj rokoj kaj apikaj montpintoj, la ĉenoj transportas la riveron.

En la loka kroniko de Luding-gubernio estas notite, ke ĝi finkonstruiĝis en 1706 kaj la imperiestro Kangŝji de Ĉing-dinastio donis al ĝi la nomon Luding-ponto. Ĝi, 104 m. longa, 3 m. larĝa kaj 16.6 m. alta, estas farita el lignaj tabuloj sternitaj sur 9 ferĉenoj, ambaŭflanke de ĝi pendas po du ferĉenoj servantaj kiel balustradoj. Ĉe la orienta kaj okcidenta ekstremoj de la ponto staras po unu turo je 20 m. alta, unu ferbovo kaj unu fera skolopendo. Ili montris la volon de la popolo subigi la akvan demonon kaj sekurigi eterne la ponton.

Luding-ponto famiĝas per siaj longa historio, originala konstrutekniko kaj situo en la strategie grava loko inter Siĉŭan kaj Tibeto. La 29-an de majo 1935, la Ĉina Laborista-Kampanara Ruĝa Armeo atingis tien en la Longa Marŝo kaj estis barita. 22 bravuloj kroĉis sin al la ferĉenoj sen tabuloj, konkeris la ponton en pluva pafado de la malamikoj kaj tiel malfermis la vojon al la nordo por la Ruĝa Armeo. De tiam Luding-ponto kaj ilia bravaĵo famiĝis tra la tuta lando. Nun sur la orienta bordo 500 m. for de la ponto staras monumento pri la konkero de Luding-ponto, sur kiu estas registrita la brila venko de la ruĝaj arme-

anoj. Deng Ŝjaŭping, gvidanto de Ĉinio, skribis vortojn por la monumento.

Ankaŭ la pitoreskejoj de Garze-subprovinco estas okulfrapaj. La monto Gongga, la "unua montpinto en Siĉŭan" kaj la 11-a en la mondo, troviĝas en la tri gubernioj Kangding, Luding kaj Ĝiŭlong. La ĉefa montpinto estas 7 556 m. alta super la marnivelo. Inter la montoj 7 000-8 000 metrojn altaj super la marnivelo en la mondo, ĝi estas la plej majesta kaj plej kru-ta. Ĉirkaŭ ĝi staras 45 montoj kun alteco de pli ol 6 000 metroj super la marnivelo. Ili formis la montaron Daŝjŭe kaj el ili multaj estas ne konkeritaj.

Gongga-monto havas 71 modernajn glaciriverojn kun areo de 297.5 kvadrataj kilometroj. Vertikale varias la klimato ĉe Gongga, tial ĉe ĝi troviĝas naturaj pejzaĝoj de la tropika, mez-varma kaj glacia zonoj. Ĉe la orienta deklivo de la ĉefa pinto estas la rivervalo Hajlŭogoŭ, fama pro sia tipa glacirivero. La glacirivero de Hajlŭogoŭ 14.7 km., longa trapasas la regionon de 6 750 ĝis 2 850 m. super la marnivelo kaj estas unu el la plej orientaj kaj plej mal-altaj glaciriveroj de nia lando. En la valo kreskas primitiva arbaro kovranta 70 kvadratajn kilometrojn. La glaciriveroj etendiĝas en la arbaron je 6 km. La valo havas tipan trajton de perfekta vertikala naturzono. En ĝi estas antikva morena lago, varmaj mineralaj fontoj en granda flukvanto kaj multaj raraj bestoj, tial ĝi estas rara natura riĉaĵo de Ĉinio. La koncernaj departementoj nun esploras, ĉu eble estas konstrui ĝin en glaciriveran parkon.

MOROJ DE KANGDING

La ĉefurbo de Garze-subprovinco Kangding en la valo de

Ĝedo-rivero najbaras al Paŭma-monto sudoriente (Paŭma ĉinlingve signifas ĉevalkuron), limtuŝas Alamugong-monton okcidente kaj frontas kontraŭ la ruboskrapanta Ĝoda-monto nord-oriente, Ĝedo-rivero trafluas la urbon, kuniĝas kun la suden fluanta Jala-rivero antaŭ Ĝoda-monto kaj fluas orienten en Dadu-riveron. Tio faras Kangding bela altebenaĵa monturbo.

La antikva Kangding apartenis al la gruntbova tribo kaj estis nur malgranda vilaĝo en la dinastioj Ĵŭan kaj Ming (1279 — 1644). Poste komercistoj inter Tibeto kaj Siĉŭan plimultiĝis kaj prenis ĝin kiel negocan centron. En Ĉing-dinastio (1644—1911) ĝi oficiale fariĝis gubernio.

La "Amkanto de Kangding" famigis la urbon. Ĝi tekstas jene:

*Super Paŭma-monto
ŝvebas nubo
Arka luno brilas
super Kandding-urbo,
super Kangding-urbo.
Li-familia fratino
ĵamas per la belo!
Ĝang-familia frato
raviĝas de ŝia belo!
Li ekamas ŝin
sub la arka luno.*

La kanto estis premiita per arĝenta medalo pro sia bela melodio, kiu tuŝis la koron de la aŭskultantoj en la Internacia Junulara Festivalo de 1952. Famigis pro tio ankaŭ Paŭma-monto.

La urbo Kangding havas tradiciajn festojn Surmonta Rondiro kaj Ĉevala Galopado.

La 8-a de la kvara monato ĉiujare laŭ la luna kalendaro estas la naskiĝtago de Ŝakjamunio. Legendo diras, ke drako ŝprucigis aroman pluvon sur la ĵus naskitan budhon. Tial la bud-

histoj tiutage lavas la budhan statuon per akvo kun diversaj famaj aromaĵoj, pro tio la tago estas alinomata la Budho-bana Festo. Sed en Kangding oni lavas la budhan statuon ne per akvo kun famaj aromaĵoj, sed aspergas ĝin per pura akvo. Tiutage al la lamaoj estas malpermesite eliri. Laŭdire, ĉe la eliro ili vundos herbojn kaj insektojn, tial ili sidas en la temploj kaj akceptas nutraĵon de la kredantoj, kiuj opinias, ke doni almazon al la lamaoj kaj rondiri ĉirkaŭ la urbo Kangding povas evitigi al ili plagon kaj mizeron. Tial la surmontaj rondirantoj estas tre multaj. Tiam ĉarmas printempo, floras rododendroj kaj tajdas homfluoj en la urbo. Ĉie en ĝi oni vendas diversajn manĝaĵojn kaj prezentiĝas akrobataĵoj, diversaj ludoj kaj Siĉŭan-opero. Tibetanoj drinkas sidante surtere aŭ dancas kantante. Estas vere eksterordinara spektaklo. La printempa ekskurso iom post iom malfortigas la budhisman aktivadon.

La tradicia ĉeval-galopado laŭdire originis en la tempo de la prefekto Mingĝeng. La 13-an de la kvina monato ĉiujare laŭ la luna kalendaro la prefekto kultis la montan dion de sia familio sur Paŭma-monto. Surmontiĝis ankaŭ la lamaoj de la temploj de Kangding kaj la 48 cent-familiaj estroj sub la prefekto por kulti la montan dion. La knaboj en ruĝa vesto sur ornamitaj ĉevaloj faris ĉevalan konkurson.

Post Mingĝeng daŭris la ĉeval-konkurso, sed malmultiĝis la kultantoj de la monta dio. Depost 1949 malaperis la kulto, ankaŭ la ĉeval-konkurso okazas en ebena loko ĉe la montpiedo. Paŭma-monto nun estas vidindejo de la urbo Kangding kaj allogas turistojn. □




Kangding rigardata de malproksime


Templo Ĝjiŝjang en Kangding







Blanka stupao sur Païma-monto



Urbeto Luding apud Dadu-rivero



Luding-ponto super Dadu-rivero

Sur strato en Kangding



LA DUA INTERNACIA AKADEMIA KONFERENCO PRI SCIENCO KAJ TEKNIKO EN ESPERANTO OKAZONTA

La Ĉina Akademio de Sciencoj decidis okazigi en Pekino la nomitan konferencon de la 10-a ĝis la 16-a de aŭgusto 1988. La ĉefa temo de la konferenco: "La reciproka influo de la scienco kaj tekniko kaj la socio". Ĝi konsistas el jenaj eroj: "La influo de la nova teknika revolucio sur la nuntempaj ekonomio kaj socio"; "Kiel la novaj teknikoj ŝanĝas nian ĉiutagan vivon?"; "La socia utiligo de scienc-esploraj fruktoj"; "Nuntempaj medicinaj teknikoj pri sanprotekto, kuracado kaj preventado" kaj "La nova teknika revolucio kaj daŭra edukado". La preparadon pri la konferenco plenumas la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Tiuj, kiuj deziras partopreni ĝin, sendu la tekston de sia disertaĵo antaŭ la fino de januaro 1988, al jena adreso: Sekretariejo de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, 52, Sanlihe, Beijing, Ĉinio.

HU ĈJAŬMU AKCEPTIS RAPORTISTOJN DE EPC

Hu Ĉjaŭmu, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio (KPC) kaj la honora prezidanto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, akceptis niajn raportistojn Hoŭ Ĝiping kaj Caj Ming kaj demandis ilin pri la Esp-movado en- kaj eksterlanda, precipe pri la preparado al festado de la centjara jubileo de Esperanto. Informiĝinte, ke 400 000 ĉinoj lernas nian lingvon, li diris, ke la nombro estas ja konsiderinda. Niaj raportistoj donacis al li Esperantajn librojn nove eldonitajn. Li demandis ankaŭ pri la eldonado kaj distribuado de EPC, gratulis la redakcion de EPC pro ĝia regula

eldonado dum la pasintaj pli ol 30 jaroj kaj ĝiaj atingoj en akcelado de la amikeco inter la ĉina kaj alilandaj popoloj, kaj esperis, ke la gazeto funkcios pli bone.

Hu Ĉjaŭmu estas unu el la famaj ĉinaj personoj subtenantaj la Esp-movadon. Jam en la frua periodo de la 30-aj jaroj, li havis rilaton kun Esperanto kaj aktive subtenis la laboron de la Ĉina Proleta Esperantista Unio. Ankaŭ EPC fondiĝis sub lia zorgo. En



Hu Ĉjaŭmu (maldekstre) kaj nia raportisto

LA JANBJAN-A ESPERANTO-ASOCIO FONDITA

La 15-an de marto 1987 fondiĝis la nomita asocio en la Janbjan-a Kore-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Ĝjilin. La fondkunvenon ĉeestis ĝiaj 320 membroj kaj diverslokaj gastoj de la subprovinco. Ĝi estas la tria Esperanta organizo fondita en la nacimalplimultaj subprovincoj de Ĉinio. Li Ĝeng'ŭen kaj Ĝjang Longhan, lokaj partiaj kaj registaraj gvidantoj, ĉeestis la inaŭguron. Lŭo Ljuĝen, vicsekretario de la Janbjan-a Subprovinca Komitato de KPC, estis invitita kiel ĝia unua honora konsilanto. Ĉjŭan Ŝjueŝji, vicprezidanto

1963 li vizitis la Ekspozicion de Esperantaj Eldonaĵoj okazigitan de la Ĉina Esperanto-Ligo. Li aprobis la proponon, ke oni per Esperanto akcelu la kulturen interŝanĝon inter Ĉinio kaj aliaj landoj kaj prenu Esperanton kiel nedevigan lernobjekton en altaj lernejoj. Lastjare li gratulis pro la okazigo de la 71-a UK kaj deziris al ĝi plenan sukceson kaj grandan kontribuon al la movado de la homaro por la paco.

de la Janbjan-a Akademio de Sociaj Sciencoj, estis invitita kiel ĝia honora prezidanto. Raporton pri la fondiĝo faris la lokaj radiostacio, televizio kaj ĵurnaloj.

ESPERANTO-KURSO EN LA INSTRUISTA INSTITUTO DE LA DALJAN-A UNIVERSITATO

En la lasta tagdeko de februaro 1987, la fremdlingva fakultato de la nomita lernejo ekfunkciigis Esperanto-kurson. 50 studentoj de la tria klaso lernas nian lingvon po 4 horoj ĉiusemajn. La lernoperiodo estas duonjaro kaj Ŭang Tajlin instruas ilin.

72.^a Universala Kongreso de Esperanto

25 - 7 ĝis 1 - 8 - 1987


VARSOVIO ATENDAS VIN

100 jaroj de Esperanto

Desegnis
RADNAI VILMOS

TERRASSA
Hispanio

Eldonis
JOSEP CERVELLÓ



Marto 1987

Glumarkoj por la centjara jubileo de Esperanto

EVENTOJ POR KAJ EN LA 100-JARA JUBILEO DE ESPERANTO

Hungario: Okaze de la jubilea kongreso de la Hungara Esperanto-Asocio, János Kádár, ĝenerala sekretario de la Hungara Socialisma Laborista Partio, skribis leteron por varma gratulo al HEA kaj al la partoprenantoj de la 28-a kongreso okazigita de la 20-a ĝis la 22-a de marto 1987 en Budapeŝto. Ni parte ĝin citas kiel jene:

“La ekesto de la lingvo Esperanto kaj la movado mem de komence reprezentas noblajn homamajn strebadojn: helpi la interpopolan proksimiĝon, la pli bonan komprenon kaj la pli altan reciprokan estimon. La disvastiĝo de Esperanto en la pasintaj cent jaroj pruvis la ĝustecon de viaj movadaj celoj.

“Nun ni vivas en la epoko, kiam la servado de ĉiuj tiuj celoj fariĝis pli grava ol iam antaŭe. Ankaŭ via humanisma movado kontribuis, ke la espero, enhavata eĉ

de la nomo de la lingvo, fariĝu realo rilate al la paca estonteco de la homaro, al la pacaj interŝtataj kontaktoj.”

Venezuelo: Antaŭ nelonge, la nova Esperanto-organizaĵo “Venezuela Esperanto-Unuiĝo” naskiĝis en la okcidenta urbo MARACAIBO: Ĝi konsistas el la sekcioj blindula, filatela kaj aliaj. Sano David Valecillos elektiĝis kiel prezidanto de VEU. La organizaĵo havigas al si bibliotekon kaj pro tio estas bonvene sendi Esperantajn librojn, revuojn ktp. al: Venezuela Esperanto-Unuiĝo (David G. Valecillos V.), Calle 79 Nr. 3C-72, MARACAIBO-4002, Venezuelo.

Sovetunio: Cele al daŭra pliriĉiĝo de la antaŭ nelonge fondita Muzeo de Paco kaj Solidareco kaj ankaŭ al ekspozicio pri la agado por la sana vivmaniero, kontraŭ alkoholaĵo kaj fumado en diversaj landoj, la Samarkanda Klubo de Interpopola Amikeco konstante



Membroj de la Venezuela Esperanto-Unuiĝo

kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn porpacajn afiŝojn, (infan)desegnaĵojn, fotojn, insignojn, gluetikadojn, leterojn, librojn, poŝtkartojn, revuojn kaj ĉiujn ceterajn pacpropagandilojn. Bv. sendi ilin al: Museum of Peace and Solidarity, c/o International Friendship Club “Esperanto”, P.O. Box 76, 703000 Samarkand, Uzbekistan, USSR.

Britio: La Jubilea Komitato de Esperanto-Asocio de Britujo organizos Esperantan Kulturestan Feston en Londono inter la 3-5-a de julio 1987. Ĝi celas feston de la centjariĝo de Esperanto kaj samtempe allogon de neesperantaj komunikiloj pere de distraj teatraĵoj, kantoj, muziko kaj dancado. Ekspozicioj pri la diversaj facetoj de Esperanto estos aranĝitaj en la vestiblo de la kongresejo.

Krome, oni lanĉis Esperanto-Vinon speciale honore al la Jubileo de Esperanto. La vino estas blanka angla vino el vinberoj kultivita en Anglio kaj la boteloj portas Esperantajn etiketojn. Mendopeton oni sendu al St George's Vineyards, Waldron, East Sussex, Anglio.

Jugoslavio: la Jugoslavia Asocio de Fervojistoj-Esperantistoj aperigis en kadro de celebrado de 100-jariĝo de Esperanto novan afiŝon (70 × 50 cm) kun fervoja motivo (trajno sur ponto) kaj du novaj sloganoj: “Fervojo kaj Esperanto-pontoj de paco kaj interkompreniĝo” (supre) kaj “Ellernu in-

tdrnacian lingvon Esperanto — interamikiĝu kun la tuta mondo” (sube). En la maldekstra angulo troviĝas emblemo de JAFE kaj jubilea signo de UEA.

ABONU “ESPERANTISTA VEGETARANO”

La bulteno “EV” estas organo de la Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio kaj kvarfoje jare eldonata de la Slovacia Esperanto-Asocio. La celo estas reformi vivkaj nutrad-manieron. Informpeton skribu al la redakcio: Stano Marček, Zvolenska 15, CS-036 01 Martin, Ĉeĥoslovakio.

EL LA KONGRESA KOMUNIKO

Anstataŭ la tradicia interkona vespero, oni en Varsovio planas novstilan aranĝon, kiu ebligas ne nur konatiĝon inter la kongresanoj, sed ankaŭ ilian miksiĝon kaj konatiĝon kun varsoviianoj. Temos pri Interkona Posttagmezo, sur la granda placo antaŭ la kongresejo, de la 15-h. ĝis

la 22-horo. Por tiu okazo la placo transformiĝos en subĉielan foiron, kun multaj budoj, kun scenego por varsoviaj kaj alilandaj artistoj. Funkcios dume la akcepte-

jo en palaco, la restoracioj kaj pluraj aliaj salonoj estos malfermaj por trankvile ripozi aŭ konversacii kun novaj kaj malnovaj geamikoj. □

POR LA JUBILEA JARO 1987

AFIŜOJ


PRESAĴOJ

GLUMARKOJ

Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM) eldonis afiŝojn, poŝtkartojn kaj glumarkojn por memorigi la 100-jaran datrevenon de la Internacia Lingvo (Esperanto) en 1987.

Baza simbolo: Fotoreproduktaĵo de la skulptaĵo “La Espero” de la konata dana skulptisto Jesper Neergaard, filo de Paul Neergaard, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto.

Teksto de Ivo Lapenna esprimanta la rolon de Esperanto kiel monda komunikilo kaj ĝian idean signifon.



POR PACO EN LIBERECO - POR LIBERECO EN PACO

MONDA KOMUNIKADO

INTERPOPOLA AMIKECO

HUMANECA INTERNACIISMO

LA INTERNACIA LINGVO - ESPERANTO 1887 - 1987

© 1987 INTERNACIA CENTRO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

La poŝtkarto, 11 cm x 15 cm

La afiŝo, 48 cm x 68 cm

“La Espero”

NOVA ALBUMO

Vojaĝo tra Ĉinio

Ĉinio kun vasta teritorio kaj historio de 5 000 jaroj havas sennombrajn historiajn restaĵojn. La albumo konigas al vi 23 turismajn urbojn de Ĉinio kaj la Tri Gorgoĵojn de Jangzi-rivero. Ĝi helpas vin koni ĝenrojn, pladojn kun loka gusto, modernajn hotelojn kaj ĉefajn vidindajn lokojn, kiaj la fama antikva ĉefurbo Pekino, la urbo Ŝĵian konata kiel muzeo de la ĉina historio, la “paradizoj” Suĝoŭ kaj Hangĝoŭ, la urbo Gujlin kun pejzaĝoj plej belaj en Ĉinio kaj la urbo Lhasa sur la monda tegmento. Tiuj urboj povas reprezenti la malfermitajn turismajn rbojn de Ĉinio. La albumo estis kompilita de la redakcio de “El Popola Ĉinio” kaj eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ĝi, 136-paĝa kun 166 koloraj bildoj kaj 25 klaraj turismaj mapoj, bone servos al la vojaĝantoj en Ĉinio kaj havigos

al niaj legantoj, kiuj ankoraŭ ne vizitis Ĉinion, belan ĝuon, kvazaŭ ili mem vojaĝus en tiuj lokoj.



Formato: 185 mm. x 260 mm.

Prezo: US\$12,50 £8,80

(85-Es-284p)

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**
Peranto de EPC

aŭ **Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**

La Ĝjan'an-a literaturo, Caŭ Caŭ kaj liaj filoj

de MEJ ĜI



Caŭ Caŭ

En la lastaj jardekoj de la Orienta Han-dinastio (25-220 p. K.) aperis senprecedence granda tumulto en Ĉinio: Kamparanaj ribeloj envolvis la tutan landon, unu kontraŭ la alia luktis la diversaj klikoj interne de la regantaroj, grandaj kaj malgrandaj militaristoj senĉese interbatalis, ĉio ĉi displitis la unuigitan Ĉinion. La popolanoj multe suferis de tio kaj en la tuta lando ĉie sentebliis forta malkontento. Tia stato daŭris ĝis pereado de la Orienta Han-dinastio kaj la naskiĝo de la tri regnoj Ŭej (220-265 p. K.), Ŝu (221-263 p. K.) kaj U (222-280 p. K.).

Ĝjan'an-erao estis ĝuste en tiu splitiĝa kaj tumulta periodo. "Ĝjan'an", de 196 ĝis 220 p. K., estis kronologia titolo de la lasta imperiestro Liŭ Ŝje de la Orienta Han-dinastio. Laŭ la literatura kategorio la Ĝjan'an-a literaturo ne limigis sin en tiuj mallongaj 25 jaroj.

La Ĝjan'an-a literaturo okupas gravan lokon en la literatura historio de Ĉinio. Ĝia plej elstara atingado estas poezio. Tiam aperis multaj eminentaj verkistoj. Caŭ Caŭ, liaj du filoj kaj sep eminentuloj de Ĝjan'an (Kong Ĵong, Ĉen Lin, Ŭang Can, Ŝju Gan, Ĵuan Ju, Ĵing Ĵang kaj Liŭ Ĝen) estis la tiamaj reprezentaj verkistoj. Iliaj verkoj heredis la eminentan tradicion de la popolkantoj de *jŭefu* de Han-dinastio, rompis la poezian deprimon en la Orienta Han-dinastio kaj levis la unuan alttadjon de poezio en la ĉina literaturo. Iliaj verkoj spegulis la riĉan vivon, prezentis la spiriton de la nova epoko kaj formis originalan stilon patosan kaj tristan, t. n. la Ĝjan'an-an stilon. Iliaj poemoj, plejparte kun kvin-ideogramaj versoj, karakteriziĝis per simpla lingvo, freŝa kaj natura. Per tio ili metis solidan bazon de tiuspecaj poemoj en la literaturo.

Caŭ Caŭ (155-220 p. K.) estis la ĉefministro de la Orienta Han-dinastio. En la tumultaj jaroj li dediĉis sian tutan forton por ekstermi la separatismajn fortojn kaj rapide unuigis nordan Ĉinion, kio pretigis vojon por realigi lian ambicion unuigi Ĉinion. Li estis ne nur eminenta ŝtatisto kaj milita

strategiisto, sed ankaŭ iniciatinto de la Ĝjan'an-a literaturo. Li vaste kolektis ĉirkaŭ si literaturistojn kaj mem faris verkadon. Nun oni scias nur pli ol 20 poemojn verkitajn de li, malmultajn, sed bonajn. Liaj poemoj, strikte ligitaj kun lia politika vivo, spegulas liajn grandan idealon kaj heroan animon.

Iuj el liaj poemoj spegulis la tumultan staton en la lasta periodo de la Orienta Han-dinastio. Tiuj mornaj poemoj prezentis profundajn melankolion kaj simpaton de la aŭtoro al la mizera popolo en milito. Ekz., la famaj poemoj "Ŝjeluŝing" (pri la ĉefurbo Lŭojang post prirabado), "Haŭliŝing" (pri la popola mizero en milito) kaj aliaj. "Ŝjeluŝing" fidele priskribas, kiel la militaristo Dong Ĝŭo senbride prirabis la ĉefurbon Lŭojang kaj cindrigis palacon kaj popolajn loĝdomojn. "Haŭliŝing" kun nur 80 ideografiaĵoj skizis la historian fakton, ke Ĵuan Ŝaŭ, Ĵuan Ŝu kaj aliaj militaristoj sub preteksto de puna ekspedicio al Dong Ĝŭo grandigis sian armeon kaj ĉiamaniere ekspansiigis sian regareon. La versoj prezentas fortajn amon, malamon, laŭdon kaj riproĉon de la poeto. La versoj

*Kverelis militestroj por la povo,
Batalis ili poste per la glavo.*

montras liajn malamon kaj indignon al la intermilitarista batalo.

*Skeletoj kuŝas sub ĉielkupolo,
En vast' mil-lia* mankas kokeriko,
Postvivas nur centono de l' popolo,
Korŝiras vere penso pri l' tragiko.*

La kvar versoj prezentas teruran bildon: sterniĝas homaj ostoj ĉie sur vasta dezerta kamparo, kaj montras la korŝiran doloron de la poeto.

Liaj aliaj poemoj prezentas lian ambicion unuigi la landon kaj obstinan strebadon. Tiuj poemoj, emociaj kaj tristaj, estas kun pli forta lirika etoso. Ni prenu kiel ekzemplon la poemon "Se Longe Vivas Fe-testudo". La poeto klare sciis, ke la homa vivo estas limigita kaj ĉiu ajn heroo

mortas, tamen li neniom deprimiĝis. Li asertis, ke maljunulo devas persisti en sia ambicio.

Iuj el liaj lirikaj poemoj priskribas ankaŭ naturan pejzaĝon. Ekz., “Rigardo al Maro” bildigas vastan ondan maron. Ĝi tekstas jene:

*Ascendis mi al Gjeŝi-monto,
Por pririgardi l' bluan maron.
En l' akvvastaĵ' tumultas ondoj,
Frapadas la insul-kliĝaron.
Arbaroj kreskas en prospero
Kiel la herboj sur la tero.
Aŭtuna vento ĝemsusuras,
Impete altaj ondoj kuras.
Verŝajne l' sun' kaj lun' sin levas
El sino de l' akv-elemento,
Kaj supreniri el ĝi devas
La steloj de la fimamento.*

Kvankam tiuj versoj priskribas nur pejzaĝon kaj ne prezentas lian ambicion, tamen la poemo sentigas al la legantoj liajn vastan animon kaj heroan aspiron en komando de armeoj.

La poemoj de Caŭ Caŭ fontis el la popolkantoj de *jüefu* de Han-dinastio, tamen havas originalan stilon. Precipe la patosa, trista kaj kortuŝa etoso en liaj poemoj sentigas grandan stimulon kaj inspiron.

Caŭ Pi (187-226 p. K.) estis la dua filo de Caŭ Caŭ. Li heredis la oficon de sia patro kaj imperiestriĝis por sep jaroj. Liaj atingoj en literaturo estas malpli grandaj ol tiuj de liaj patro kaj frato Caŭ Ĝi (192-232 p. K.), tamen liaj versoj havas sian neignoreblan lokon en la ĉina literaturo.

Inter la poemoj de Caŭ Pi elstaras tiuj pri amo kaj trista sopiro de geamantoj. Ekz., la poemo “Laŭ Melodio de Jan” kaj aliaj vivece kaj fidele prezentis nostalgion de elmigrinto kaj sopiro de hejme restanta edzino. El ili “Laŭ Melodio de Jan” estas la plej fama. Per trista priskribo ĝi bildigas la sopiron de virino al ŝia edzo en sendorma aŭtuna nokto. La poemo subtile kaj kortuŝe priskribas ŝian psikon.

La poemoj de Caŭ Pi spegulas nur mallarĝan flankon de la tiama vivo kaj lia arta stilo estas febla.

El la eseoj de Caŭ Pi nun restas nemultaj, el kiuj liaj du leteroj al amiko U Ĝi estas famaj lirikaj prozaĵoj. La leteroj prezentas liajn melanĉolion kaj funebnon al la amiko, sopiron al la kunaj ekskursoj kaj festenoj en la pasinteco. La stilo de liaj verkoj estas freŝa kaj flua. Krome, aparte menciinda estas lia faka verko “Pri Klasi-

kaĵoj”. Nun nur du artikoloj el ĝi restas, unu estas “Pri Artikoloj”, kiu faras trafan takson al la verkistoj de Ĝjan'an-periodo kaj pritraktas stilojn de la verkoj kaj la karakterojn de la verkistoj, tial ĝi estas rigardata kiel bazo-meta verko en la historio de la literatura kritiko de Ĉinio.

El la verkistoj de Ĝjan'an-periodo Caŭ Ĝi estis la plej eminenta. Liaj atingoj en literaturo estas la plej elstaraj, li postlasis multajn verkojn, sume pli ol 80 poemojn kaj pli ol 40 prozajn verkojn kaj *fu*-ojn.

La vivo de Caŭ Ĝi dividiĝis en du partojn: antaŭ kaj post la imperiestriĝo de lia pli aĝa frato Caŭ Pi. En la antaŭa periodo li estis admirata kaj ŝatata de la patro pro sia superhoma talento kaj preskaŭ nomumita kronprinco. En la posta periodo imperiestriĝis Caŭ Pi kaj poste lia filo. Ili havis al Caŭ Ĝi profundan suspektemon kaj lin subpremis kaj persekutis senskrupule. Kvankam li ne perdis la princecon, tamen li, moroza, neniam havis ŝancon por montri sian talenton. Fine li mortis en deprimado kaj indigno.

Jam de lia juneco Caŭ Ĝi tiklis honoro kaj gloro, tamen pro la influo de la tiamaj sociaj moroj li fariĝis senskrupula kaj senbrida, kio formis ankaŭ la bazan spiriton en liaj verkoj. Pro la ŝanĝiĝo de liaj vivo kaj situacio, liaj verkoj en la du periodoj havas evidentan diferencon.

La poemo “Ĉevalo Blanka” estas reprezenta verko en lia antaŭa periodo. Ĝi skulptas heroon kun alta luktarto, sin oferantan al la patrolando. La poemo admiras:

*Se li sin metas inter glavojn akrajn,
Ĉu sentas li pro l' vivo maltrankvilon?
Li eĉ ne zorgas la gepatrojn karajn,
Do malpli la edzinon kaj la filon.
Troviĝas lia nom' en la bravula listo,
Ja li ne devas esti egoisto.
Por savi l' patrolandon el danĝero,
Sin doni brave povas li sen tristo.*

Tiuj heroaj versoj fakte estas memkonfeso pri la ambicio de la poeto mem. La similaj poemoj “Famaj Urboj”, “Fiŝetoj” kaj aliaj montras lian streban spiriton. Ilia stilo baziĝas sur sereno kaj optimismo.

Post la surtroniĝo de Caŭ Pi, al la vivo de Caŭ Ĝi okazis abrupta ŝanĝiĝo. Laŭdire, Caŭ Pi iam ordonis lin verki poemon dum sep paŝoj, alie li faros al li grandan punon. Caŭ Ĝi tuj improvizis:

*Por havi el ĵab' kuirita la sukon
Kaj fari el tio laktecan ĵabsupon,*

*Sojfaban planttigon jen oni bruligas,
La fabo en poto plorante ekplendas:
"El sama radiko ni ambaŭ elkreskis,
Pro kio do vi min urĝeme turmentas?"*

La poemo precize montras lian tiaman situacion. Liaj poemoj en la posta periodo ĉefe prezentas tiajn situacion kaj psikon. Krome, pro malsamaj travivaĵoj kaj senĉesa riĉiĝo de la vivspertoj, liaj verkoj arte plimaturiĝis kaj multe progresis en profunda kaj vasta spegulado de la vivo.

"Al Bajma-princo Caŭ Bjaŭ" estas grava verko de Caŭ Ĝi en la posta periodo. En 223 p. K. Caŭ Ĝi, kune kun siaj fratoj Caŭ Bjaŭ kaj Caŭ Ĝang, veturis al la ĉefurbo por peti aŭdiencon ĉe la imperiestro Caŭ Pi. Caŭ Ĝang mortis en la ĉefurbo. Kiam Caŭ Ĝi kaj Caŭ Bjaŭ revenis al siaj feŭdoj, al ili estis malpermesite kune veturi. En indigno li verkis la poemon al Caŭ Bjaŭ. En la poemo kun sep strofoj li unue rakontis siajn nostalgion al la ĉefurbo kaj laciĝon en la vojaĝo, emfaze priskribis sian suferon de malsato, soifo kaj laciĝo survoje, kaj poste montris, ke la plej granda sufero estas ne fizika, sed eterna disiĝo de la fratoj kaj la politika persekutado. Pli poste li esprimis sian funebbron al Caŭ Ĝang, je kio li sentis la vivon kaprica kaj nesekura, pretervole falis en malĝojon kaj teruron. Tiuj versoj pri lia bedaŭra disiĝo kun Caŭ Bjaŭ estis mornaj kaj kortuŝaj. Li diras:

*Por vir' aktiva ĉie tra la mondo,
Mil-lia* foro ŝajnas nur najbara.*

Tuj poste li diras:

*Forpasis frat' subite el la rondo,
La kor' ne povas esti ne amara.*

Tia konsolo en ŝajnigita ĝojo prezentas pli profundan senton kaj malfacilan staton de Caŭ Ĝi. La poeto neniel povas sin deteni de la kolero kaj laŭte krias:

*Ululas strigoj sur la ĉar-timonoj,
Ŝakaloj, lupoj kaŭras sur la stratoj.
Makulas blankon muŝ-friponoj,
Pro kalumni' disiĝas karaj fratoj.*

Li forte akuzis la persekutadon fare de Caŭ Pi.

Liaj postaj vivo kaj situacio proksimigis lin al malsupraj socitavoloj kaj ebligis al li pli profunde koni ilian mizeron. Ankaŭ tio speguliĝas en liaj verkoj. Ekz., la poemo "Tajŝan-Ljangfujin" per lakonaj versoj bildigas mizeran vivon de marbordaj loĝantoj kaj prezentas la profundan simpatian de la poeto al ili. Jene ĝia plena teksto:

*De lok' al lok' varias la vetero,
Malsamas la klimatoj de la tero.
Terure malfacilas viv' ĉe l' maro,
Sur stepo dezerteca en mizero.
L' edzinoj kaj infanoj best-similas,
Pro l' montoj, arboj iro malfacilas.
Iliajn pajlkabanojn vere povrajn
Eĉ vulpoj kaj leporoj trudeniras.*

La poemo "Sep Ĉagrenoj" priskribas melankolion de soleca virino per simpatiaj kaj indignaj vortoj.

Kvankam Caŭ Ĝi en sia posta periodo vivis en malglata situacio, tamen neniom mildiĝis lia ambicio. En siaj poemoj li diras, ke li preferas sin oferi al la granda landunuiga afero ol vivi nenifarante.

*Mi volas venki transrivere,
Malhavas, bedaŭrinde, transportanton.
Senfare vivi por mi 'stas mizere,
Volontas doni min por venĝi l' landon.
Herooj multe tristas pro l' patrio,
Fiuloj ĝuas vivon nenifaran.
La regna venĝo restas en deĝio,
Oferos mi volonte l' vivon karan.*

Tiuj patosaj versoj refoje sentigas la streban spiriton en liaj fruperiodaj verkoj, kiaj "Ĉevalo Blanka" kaj aliaj. La diferenco inter ili kuŝas en tio, ke liaj indigno kaj bedaŭro pro la neplenumbleco de la heroo aspiro donis tragikan nuancon al la poemoj.

Liaj poemoj, sen afekteco kaj gracileco, karakteriziĝas per bela formo, zorge elektitaj vortoj, apliko de sentencoj kaj lertaj komparoj. Ili elspiras riĉajn vivan etoson, veran senton kaj folklorajn kantojn. Ekz., "Belulino" imitis la formon de la poemo "Ĉe Morusarboj" de ĵuefu de Han-dinastio, sed evidente diferencas de ĝi per delikata priskribado kaj pompaj vortoj. Taksante liajn poemojn, oni diris, ke ili "havas tre noblan karakteron kaj pompajn vortojn". Tiuj vortoj bone resumis la trajtojn de liaj poemoj.

Caŭ Ĝi verkis ankaŭ nemalmultajn brilajn prozaĵojn kaj fu-ojn, inter kiuj estas la fame konata "Pri la Diino de Lŭoŝuj-rivero". Ĝi, kun rakonto pri la bela diino en mito kiel bazo, bildigas puran kaj sentimentalan virinon. La aŭtoro montras en la verko sian korinklinon al la diino kaj aflikton pro nerealegebla revo. Ĝi estas saturita de lirika etoso. La priskribo estas tre bela kaj kortuŝa, tial ĝi estas famega artikolo jam de la antikveco.

* Lio = duonkilometro

SE LONGE VIVAS FE-TESTUDO

de CAŬ CAŬ (155-220 p.K.)

*Se longe vivas fe-testudo,¹
Finfine trafos ĝin la morto;
Eĉ drakserpent² kun lert' de flugo
Polviĝos fine laŭ la sorto.
Maĉante olda kurĉevalo
Deziras gajni en finalo;
En grandaĝeco brava viro
Aspiras venki en batalo.
Pri longo de la vivoporto
Decidas ne nur homa sorto.
Se oni bone sin flegadas,
Malfrue venos do la morto.*

LAŬ MELODIO DE JAN

de CAŬ PI (187-226 p.K.)

*Susure spiras frostar senton vento de aŭtuno,
Folioj falas de la plantoj pro palpad' de prujno.
La cignoj kaj hirundoj flugas reen al la sudo,
Ĉagrenon multe sentas mi pro fora vi en nuno.
Je fortaj sentoj hejmsopiraj via kor' plenplenas. . .
Pro kio aliloke restas vi kaj ne revenas?
Via edzino en malplena ĉambro triste splenas;
En morno, la memoro mia ĉiam vin entenas;
Ne rimarkite miaj larmoj sur la vestoj tremas.
Mi prenas kordan instrumenton,
pluke Ĉingŝang³ donas,
La rapidritma muzikaĵo ne adaĝe sonas.
Prilumas klare mian liton jen la luno hela,*



*Kliniĝas okcidenten la Arĝent-rivero⁴ stela.
La Teksistino kaj Bovist⁵ disstaras ĉe l' rivero.
Pro kio ambaŭ disigitaj vivas en sufero?*

ĈEVALO BLANKA

de CAŬ ĜI (192-232 p.K.)

*Ĉevalo blanka jen en brid' el oro
Galopas fluge al nordokcidento.
Ja kies filo estas la sinjoro?
Li estas kavalir' el Joŭ-Bing-gento⁶.
Knabaĝe la hejmlokon li forlasis,
En limdezerto li renomon ĉasis.
Arkpaŝis li en noktoj kiel en tagoj,
Foruzis multon da hu-lignaĵ⁷ sagoj.
Li streĉas l' arkon kaj al celoj paŝas,
Jen dekstren, jen maldekstren, ĉiam trafas
Tutsame ĉu simion ĉu ĉevalan hufon,
Kaj lia lerto vere ĉiujn ravas.
Li movas sin pli vigle ol simio,
Ferocas kiel leopard' kaj rio⁸.
Alarmas ofte ĉe l' landlimaj urboj,
Manovras fremda la kavalerio.
De l' nordo plumletero⁹ jen alvenas,
Li surĉevale altan digon saltas.
Li hurojn pelas, pune frakas-premas;
Kaj life li ŝjanbej-ojn¹⁰ peze batas.
Se lisiĝ metas inter glavojn akrajn,
Ĉu sentas li pro l' vivo maltrankvilon?
Li eĉ ne zorgas la gepatrojn karajn,
Do malpli la edzinon kaj la filon.
Trovegas lia nom' en la bravula listo,
Ja li ne devas esti egoisto.
Por savi l' patrolandon el danĝero,
Sin doni brave povas li sen tristo.*

Elĉinigiŝ LAŬLUM

¹ Aparte longviva speco de testudo.

² Fabela serpento kiu povas flugi.

³ Rapidritma melodio.

⁴ Arĝenta Rivero=Lakta Vojo. Okcidenten-kliniĝo de la Arĝenta Rivero en aŭtuna nokto signifas proksimiĝon de la noktomezo.

⁵ Teksistino (Vego) kaj Bovisto (Altajro) estas geedzoj en tre populara ĉina popolrakonto. Ili estas apartigitaj de la diino Ŭangmu per la Arĝenta Rivero, kiun ŝi kreis per sia harpinglo.

⁶ Joŭ kaj Bing estis du nordaj regionoj en antikva Ĉinio, kie aperis multe da bravaj kavaliroj.

⁷ Huo estas speco de arbo, kies ligno taŭgas por fari sagojn.

⁸ Rio estas speco de fabela drako en flava koloro.

⁹ Plumletero estis letero kun aldonita plumo kiel signo pri urĝa informo en antikva Ĉinio.

¹⁰ Ŝjanbej-oj estis norda popolo en antikva Ĉinio, kiu klopodis invadi la centran parton de la lando.

Ĉinaj alumet-markoj

de LAN ŜAN

La markoj sur la alumet-skatoloj, kvankam malgrandaj kaj ordinaraĵoj, tamen prezentas eksterordinaran arton. Ili similas al ĝiĉetoj, tra kiuj oni povas koni la politikon, historion, sciencon kaj kulturon de la koncernaj landoj. Oni ŝatas tiujn

buntajn bildetojn kaj donis al ili belan nomon ĉarma alumet-marko. Alumet-markoj, kiel la memorigaj poŝtmarkoj, estas kolektataj, aprecataj kaj esplorataj de la amatoroj, kaj oni rigardas alumet-markojn kaj poŝtmarkojn kiel "fratinojn".

Diversaj alumet-markoj




Diversaj alumet-markoj



La alumet-markoj naskiĝis kun la apero de alumetoj. Laŭ historio ili aperis pli frue ol la poŝtmarkoj. En 1837 eksterlanda alumet-fabriko jam komencis uzi alumet-markojn. Oni ankoraŭ ne estas certa, kiam en Ĉinio aperis la unua alumet-marko. Koncernaj materialoj montris: En 1860 eksterlandaj alumetoj estis enportitaj en Ĉinion. En 1879 la Ĉjaŭmin-a Alumet-fabriko, la unua nacia alumet-fabriko, fondiĝis en Gŭangdong-provinco. Ĉinio ekhavis alumetojn kaj alumet-markojn fabrikitajn de ĝi mem.

Disvolvante la alumetan industrion, Ĉinio strebis por plibonigi pakumon kaj dekoracion de alumetoj. En 1958 la bildoj sur alumet-skatoloj havis radikalan ŝanĝiĝon kaj rompis la malnovan tradician formon, rezulte de tio, aperis serioj da alumet-markoj. Ili faras la enhavojn pli riĉaj kaj pli interligitaj. Aplikante artajn rimedojn de pentrado, fotografio, kaligrafio, gravurado kaj aliaj, la projektistoj konigas per alumet-markoj ĉinajn mitojn, historiajn personojn, morojn, kutimojn, vidindejojn, antikvajn objektojn, rarajn birdojn kaj bestojn, kuriozajn



Alumet-markoj de la Ĉongĉing-a Alumet-fabriko



Alumet-markoj de la Puer-a Alumet-fabriko en Junnan

florojn kaj herbojn, sportojn, dancojn kaj bildojn pri loĝantara censo, fajro-prevento kaj kontraŭtertremo, urbo-verdigo, forstumado ktp. Ĝuste pro tio la alumet-markoj ricevis la nomon poŝa enciklopedieto.

Suĝoŭ estas ĉarma urbo en suda Ĉinio. Ĝia ĝardena arto famiĝis en- kaj eksterlande. La serio da alumet-markoj de "Suĝoŭ-aj Alumetoj" kun 10 ĝardenaj pejzaĝoj estas delikate projektita kaj kolore presita de la Suĝoŭ-a Alumet-fabriko. Ankaŭ tiuj, kiuj ne vizitis Suĝoŭ, povas ĝui per la bildoj mirinde ĉarmajn ĝardenajn pejzaĝojn de diversaj dinastioj. La ĉina palac-lanterno estas speciala metiartaĵo de Ĉinio, fame konata tra la mondo. Multaj alumet-

fabrikoj de Pekino, Ŝjuĝoŭ, Kantono k.a. produktis alumetojn kun alumet-markoj de palac-lanterno. Iliaj lakonaj bildoj montris la eminentan arton de la ĉinaj palac-lanternoj, kiu havas longan historion.

En 1959 aperis kartona alumet-marĉo, kiu estis bonkvailita kaj ŝatata de la amatoroj. La serio da kartonaj alumet-marĉoj "Antikvaj Versaĵoj pri Ĝinling" (la nuna Nankino) projektita de la Nankina Alumet-fabriko havas apartan artan stilon. Ĝi konsistas el 16 alumet-marĉoj, po kvar en grupo, kiuj formas kompletan antikvan ĉinstilan pentraĵon, kun kvar antikvaj poemoj sur la skatolo-dorsoj. La serio estas eminenta verkaĵo el la alumet-marĉoj.

La alumet-marĉoj estas belaj, malkaraj kaj ankaŭ facile kolekteblaj kaj en Ĉinio ili trovas multajn kolektantojn. En la lastaj jaroj ili, kiel memorigaj poŝt-marĉoj, altiris al si ĉiam pli da amatoroj per sia ĉarmo. La Siĉŭan-a Televido filmis programeron pri alumet-marĉoj; la gazeto «Ĉinaj Alumet-marĉoj» estas stud-kampo por la ĉinaj amatoroj tiuflanke; kaj «Atlaso de Alumet-marĉoj» kaj la artikoloj tiurilataj aperigitaj en ĵurnaloj kaj gazetoj estas bonaj gvidiloj por la novaj amatoroj. Nun kolektado de alumet-marĉoj jam fariĝis amasa aktivado riĉigi postlaboran kulturan vivon de la amatoroj, multigi al ili scion, nobligi la temperamenton kaj altigi la artan aprec-nivelon. □

Ĉinaj beligistoj



En beligado

Kun sata stomako kaj belaj vestoj, nunaj ĉinaj junuloj kaj virinoj komencas sin beligi. Kvankam tiu diro estas iom simpla, tamen ne tute malprava. Kun la pliboniĝo de la materia vivo, ili pli kaj pli atentis, kiel beligi sian vivon kaj sian aspekton.

Surstrate videblas virinoj en buntaj kaj modaj vestoj, precipe en somero ili konkuras pri beleco, kaj iuj iom ŝminkitaj aspektas pli plaĉe.

En la lastaj jaroj multaj hoteletoj kaj frizosalonoj en urboj komencis servi per kosmetiko, kaj iuj el ili starigis beligejojn. Pro bezono de mia profesio kaj pro mia amo al beleco, mi vizitis kelkajn beligejojn en Pekino, konatiĝis kun kelkaj beligistoj kaj larĝigis mian horizonton.

BELIGADO KAJ KURACADO

Kiam mi eniris en la beligan centron Mejbaj de Pekino, agra-

bla varmeto kisis mian vizaĝon. Ok-angula palaca lanterno en la gusto de antikveco pendis meze de la vestiblo, diverskoloraj lampetoj jen brilis, jen mallumiĝis. En la salono montriĝis grandaj koloraj fotoj pri modaj hararanĝoj kaj bonodoris refreŝigaj drogherboj.

La beligejo kune funkciigata de Mejbaj-barbirejo kaj la Pekina Asocio de Vivbezona Kemio havas pli ol 20 beligistojn, el kiuj plejparto estas junulinoj 20-30-jaraj. En bone sidanta blanka kitelo kaj kun moda hararanĝo, ili aspektis ĉarme.

Jen iris al mi junulo kun insigno de deĵoranta direktoro sur la brusto. Informiĝinte pri mia intenco, li ĝoje akceptis min. Li akompanis min en la vizito de la beligejo. Li diris, ke la beligejo servis iom pli ol unu jaron. En la komenco klientoj venis nur por forigi la vizaĝharetojn,

reordigi la brovojn kaj iom ŝminki, kaj nun nemalmultaj por kuraci haŭtajn malsanojn.

Foje iu laboristino petis banejon forigi ŝian nevuson. Post la traktado la nevuso malgranda kiel sezamgrajno fariĝis bruna kava makulo granda kiel sojfabo. Tiu 23-jara knabino tre ĉagreniĝis. Mi renkontiĝis kun ŝi dum ŝia dua vizito al la beligejo. Mi vidis, ke ŝi portas blankan ĉapon ĝis la palpebroj, ĉar ŝi ne volis, ke oni vidu la cikatron sur ŝia frunto. Post kiam ŝi kuŝiĝis sur la seĝo, beligisto faris kaĉon el drogherba pulvoro kaj akvo kaj ĝin enfrotis en la vizaĝon de la knabino. La ŝmiraĵo formis diktan tavolon da verdeta kovraĵo. Ĝuste de tie venis la bonodoro, kiun mi flaris ĉe mia eniro. 40 minutojn poste, la beligisto forigis la sekiĝintan kovraĵon, kaj evidente heliĝis la koloro de la makulo sur ŝia frunto. La beligisto diris al mi: "La ci-

katro kaŭzita de traktado per medicinaĵo povas esti forigita post certa tempo da kuracado.”

Tiam iu juna virino ĵus beligitata kaptis mian atenton. Ŝiaj ondoforme frizitaj nigraj haroj loze pendis ĝis la ŝultroj. Ŝia prilaborita vizaĝo iom beligiĝis. Ŝi diris al mi kun amika rideto: “Mi ne timas, ke vi ridos je mi. Mi konfesas, ke mi venis el antaŭturbo speciale por beligo.”

Ĉiu scias, ke virinoj amas sin beligi, do mi ne rigardis tion kiel ridindaĵon. Sed antaŭe mi neniam aŭdis, ke kamparanino venas en urbon de malproksime por sin beligi. Eble ŝi divenis mian penson kaj diris aldone, ke antaŭe ŝia hejmloko estis malriĉa kaj neniuj volis elspezi por sin beligi. Oni devis aĉeti vinaĝon kaj salon kontraŭ kelkaj moneroj. Tion dirinte, ŝi ekridis sinĝene: “Ver-dire, oni malofte uzis eĉ tualetsapon. Nun rapide progresas la produktado. Kun mono ni kuraĝas nin beligi. Sed ni ne scias kiel nin beligi. Ni nur scias aĉeti ŝminkaĵon kun perla pulvoro, kompreneble en granda ujo.” Ŝiaj vortoj ridigis la ĉeestantojn.

Dum nia interparolo iu knabino vestita per moda bruna peltaĵo finis la beligadon. Jes, ŝi estis belega. Ŝiaj ĵus reordigitaj brovoj aldonis ĉarmon al ŝia viveca kaj klare konturita vizaĝo.

ŜI ASPEKTAS KVAZAŬ ALIA HOMO

Antaŭ unu jaro Siljan-frizosalono staranta ĉe la movoplana strato Ŭangfuĝing en Pekino estis avangarde ekipita. En la unua tago iu japana beligistino portanta rozan robon estis invitita tien por demonstri sian ar-

ton. Post ŝia prilaborado peco da nigra haŭto falis de sur la vizaĝo de iu viro; kaj beligitadon duonvizaĝo de iu virino forte diferencis de la alia duono nebeligitata. Tio vekis la admiron ĉe la rigardantoj.

Unu jaron poste, mi vizitis ŝian metilernantinon Liŭ Ŝujing. Ŝi havas 33 jarojn, sed pro la zorgaj kosmetikaj aranĝoj ŝia haŭto fariĝis delikata kaj ŝiaj brovoj etendiĝis al la tempioj. Ŝi ĉarmiĝis. Ŝi aspektis multe pli juna ol fakte ŝi estas. Montrante laktoblankecan aparaton, ŝi diris, ke tiu puriganto plenumas ok laborprocedojn. Post 40-minuta beligado oni povas atingi la efikon de ekscitiĝo kaj kvietiĝo de la vizaĝa haŭto, rapidigo de sanga cirkulado kaj akcelo de la haŭta metabolo.

Mi interparolis kun juna sinjorino Ŭang Ĝjungang, kiu atendis beligadon. Ŝi, 28-jara, laboras en la operaciejo de la Pekina Hospitalo. Post la akuŝo ŝi ricevis sulkojn ĉe la okulanguloj pro maldikiĝo. Ŝi aspektis velka pro la krudeco de la haŭto kaj malmulta tualetado. Foje ŝi provis sin beligi en Siljan kaj iom sukcesis: La vizaĝo multe glatiĝis kaj la haŭto iom delikatiĝis. Do ŝi ĉiumonate venis al la beligejo. Oni forigis al ŝi la vizaĝharetojn, reordigis ŝiajn brovojn kaj iom ŝminkis ŝin. Ŝiaj kolegoj diris, ke ŝi multe rejuniĝis kaj beligiĝis, kaj aspektas kvazaŭ alia homo. Ŝi diris: “Nun pli da virinoj de nia hospitalo venis por sin beligi.”

MIRINDA TEKNIKO

Mi vizitis en iu operaciejo ortopediisto-beligiston s-ro Li, kiu estis korektanta la vizaĝon de klientoj.

Sub lampego li operaciis iun mezaĝan virinon, por ke ŝiaj palpebroj estu duoble faldeblaj. Unue li faris per inko kelkajn punktoliniojn sur ŝiaj palpebroj por indiki la forigendan parton, injektis narkotaĵon, fortranĉis iom da haŭto kaj karno dikaj kiel alumetoj kaj dense suturis per maldikaj katgutoj. Post la operacio ne plu ŝvelis ŝiaj palpebroj.

Poste li prilaboris la nazon por iu knabino. Mi vidis lin instalita al ŝi artefaritan nazalon. Kaj ŝia plata nazo tuj elstariĝis.

La 57-jara beligisto tre bonevena al ĉinaj knabinoj iam lernis kirurgion en medicina instituto en Tajŭan, studis kosmetikan kirurgion en Osaka, Japanio, kuracis kaj prelegis en Japanio, Tajlando, Hindio kaj Singapuro. En 1986 li revenis en Pekinon kaj fondis tiun unuecan kirurgia-ortopedian beligejon. Li diris: “Tre multas miaj klientoj. Kvankam ĉiutage mi laboras pli ol dek horojn, staras kelkajn horojn ĉe operacia tablo kaj iafoje sentas kapturton, tamen mi volonte tiel servas, por ke pli da virinoj rejuniĝu kaj beligu.”

Tie mi renkontiĝis kun iu konatinino, sed ne salutis ŝin. Tamen ŝi afable vokis min. Antaŭ nelonge ŝi estis operaciita je la palpebroj kaj nazo. En mia memoro ŝi havis nazon platan kaj palpebrojn nefaldeblajn kaj montris sin malvigla. Post la operacio ŝia nazo elstariĝis kaj ŝiaj okuloj fariĝis belaj kaj tiel ŝia vizaĝo impresis reliefe. Mi forte admiris la mirindan teknikon de la beligisto.

Informiĝinte, ke mi venis por intervjuo, ŝi kondukis min antaŭ iun virinon kaj demandis min:



En operaciejo



Knabinoj atendantaj por esti beligitaj

“Kiom da jaroj ŝi havas?” Mi rigardadis kaj respondis: “Maksimume 40.” Mia respondo vekis ridegon de la ĉeestantoj. Fakte ŝi havis preskaŭ 60 jarojn. Ĝus oni sensulkigis ŝian vizaĝon, kaj tuj ŝi multe rejuniĝis. Mi demandis ŝin, kial ŝi venis por sin beligi. Ŝi diris: “Ankaŭ maljunuloj amas sin beligi kaj

esperas, ke ili ĉiam estos junaj. Mi laboras kune kun junuloj kaj kontaktiĝas kun multaj homoj ĉiutage. Mi ĉagreniĝis je la penso pri mia vizaĝo plena de sulkoj, do mi decidis min turni al la beligejo. Kvankam multe kostas la beligado, tamen mi volonte multe pagas, se nur mi povas rejuniĝi kaj revigliĝi.” □

Tarifo: 1 internacia respondkuponno por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * Dez. kor. tm. pri ĉt kaj kolekti bk. alumetetiketojn kaj fotojn. Adr.: Tempesi Mihaly, 7623 P'ecs, Kalozsvar u 12, Hungario.
- * Ni (lernantoj el ĈSSR) dez. kor. kun ĉinaj pioniroj kaj interesiĝas pri ĉio. Adr.: Zakladni Škola Alšova, Po SSM-KMP, Koprivnice 742 21, ĈSSR.
- * Carsten Koppe, GDR-1313 Wriezen/Hospitalstr. 34, dez. kor. tm., kolektas bk pri lokomotivoj.
- * Lars Kuke, GDR-1313 Wriezen/H.-Engel-str. 5, dez. kor. tm., kolektas bk. kaj kalendarojn.
- * Sandra Portner, GDR-1313 Wriezen/Mauerstr. 18, dez. kor. tm., kolektas bk. pri kantistoj.
- * Matthias Seurig, GDR-1313 Wriezen/Mauerstr. 14, dez. kor. tm., interesiĝas pri tekniko kaj kolektas pm.
- * Lars Richter, GDR-1313 Wriezen/Markt 18, dez. kor. nur kun tiuj en socialismaj landoj, kaj kolektas bk.
- * Inĝeniero-ekonomikistino dez. kor. tm. kaj interesiĝas pri legado, lingvoj kaj turismo. Adr.: Monika Jostel, Block 412/3, Halle-Neustadt, 4090, DDR.
- * 21-j. komencanto dez. kor. kun gejunuloj, kiuj interesiĝas pri interrilato de popoloj kaj futuro de la mondo. Adr.: Szegedi Ferenc, Budapest, Fehervari ut 183. 8/86, Hungario, 1119.

KVINA SESIO DE LA SESA TUTLANDA POPOLA KON- GRESO DE ĈINIO

La sesio okazis en Pekino, de la 25-a de marto ĝis la 11-a de aprilo.

Ĉefministro Ĝaŭ Zijang faris al la sesio la raporton pri la laboro de la registaro. La sesio aprobis la raporton. Ĝi sankciis ankaŭ la rezolucion pri la plano de la nacia ekonomio kaj la socia disvolvigo de 1987 kaj la rezolucion pri la efektivigo de la ŝtata budĝeto de 1986 kaj pri la ŝtata budĝeto de 1987, kaj aprobis la raportojn de la laboroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, la Plej Alta Popola Kortumo kaj la Plej Alta Prokuroroj.

La sesio opinias, ke en 1986 la ŝtato estis harmonia kaj unuiĝa, la ekonomio kreskanta kaj la socialisma afero prospera, nome la ĝenerala situacio bona. La sesio konsentis kun Ĝaŭ Zijang je lia propono pri du grandaj aferoj en la raporto, kiujn la ĉina popolo devas plenumi per la tuta energio: En la ekonomia kampo, vaste kaj profunde disvolvi la kampanjon de pliproduktado, ŝparo, enspezaligo kaj elspezredukto, profundigi la reformon de la ekonomia sistemo kaj plilarĝigi la amplekson de malfermo al la eksterlando, plenforte disvolvi produktforton, kaj garantii daŭran kaj stabilan disvolvigon de la nacia ekonomio; en la politika kampo, persisti en la kvar fundamentaj principoj, nome la socialisma vojo, la proletara diktaturo, la gvido de la kompartio kaj Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, firme oponi kontraŭ burĝara liberalismo, plifortigi la konstruadon de la socialisma spirita civilizacio, pluapaŝe solidigi kaj disvolvi la politikan situacion de harmonio kaj unuiĝo.

La sesio rajtigis la Konstantan Komitaton de la Tutlanda Popola Kongreso ekzameni kaj sankcii la

komunan deklaron pri la solvo de la Aŭmen-a problemo subskribitan de la registaroj de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Respubliko de Portugalio.

La sesio principe aprobis la Organizan Leĝon (projekto) de la Vilaĝana Komitato de la Ĉina Popola Respubliko, faris eksigon kaj nomumon de ministroj kaj estroj de kvar ministerioj kaj komi-

sionoj, kaj aldone elektis kvin membrojn al la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso.

La sesio estis plena de demokratia, unuiĝa, harmonia kaj vigla atmosfero. La kongresanoj faris multajn kritikojn kaj proponojn al la laboroj de la registaro kaj la kongreso, kio pli sukcesigis la sesion.



En la kunvenejo

PLANO POR ESPLORO KAJ DISVOLVO DE ALTAJ TEKNIKOJ DE ĈINIO

La plenumado de la plano komenciĝis en 1987. Post ripetada diskutado de diversfakaj specialistoj, oni difinis en la plano dekkelkajn kompletajn temojn en sep teknikaj kampoj kiel la celojn de esplorado kaj disvolvigo. Ili estas **Biologia tekniko:** Novaj alteproduktaj, bonkvalitaj kaj kontraŭdegenetraj specioj de animaloj kaj vegetaloj, novtipaj medikamentoj, vakcinoj, gena kuraco kaj proteina inĝenierado; **Kosmonaŭtiko:** Grandtipa portanta raketo, paca esplorado kaj disvolvigo de spacaj sciencoj kaj teknikoj; **Informotekniko:** Intelekta komputera sis-

temo, optikelektronikaj aparatoj kaj pecoj, integra tekniko de optikelektronika sistemo, kaptado kaj traktado de informoj; **Lasera Tekniko:** Altfunkcia kaj altkvalita lasero kaj ĝia apliko en produktado; **Tekniko de Aŭtomatigo:** Aŭtomata fabriksistemo per komputera sinteza kontrolo kaj intelekta roboto; **Energia Tekniko:** Karba magnethidrodinamika konverto, avangarda nuklea reaktoro; **Tekniko de Novaj Materialoj:** Altfunkcia struktura materialo kaj specialfunkcia materialo. La plano celas akceli koncernatajn fakojn de sciencoj kaj teknikoj pere de ombrelforma radiado, prenante kiel celon tiujn temojn de la pioniraj altaj teknikoj.

DEKMIL SUKCESOJ EN SCIENCO KAJ TEKNIKO DE ĈINIO EN 1986

En 1986 Ĉinio atingis 14 246 sukcesojn en scienco kaj tekniko. La cifero estis kvaroble pli granda ol tiu de 1979 kaj 1.37-oble pli granda ol tiu de 1985. El tiuj sukcesoj plimultiĝis tiaj sukcesoj, kiuj atingis avangardan nivelon en- kaj eksterlande. La kapilara ŝvitfridiga plato, premiita per ŝtata inventa medalo, povanta toleri altegan temperaturon, kiun ordinaj varmezistaj aloj ne povas, estas ŝlosila materialo debuti en la internacia merkato por la ĉina kosmonaŭtika raketo. Alia invento premiita de la ŝtato estas elektrokontakta solidmembrana protektilo, kiu povas longigi 5-10-oble la uzotempon de metalaj elektrokontaktaj pecoj.

Kompare kun la pasintaj jaroj, la sukcesoj en scienco kaj tekniko en 1986 karakteriziĝas per du trajtoj evidentaj: Unue, la praktika uzebleco, granda parto de la sukcesoj jam estas aplikataj en praktiko; due, mallongiĝis la tempo de ĝia ekspertizo ĝis ĝia praktika produktado.

47 MEDALOJ POR INVENTA- JOJ DE ĈINIO

La 9-an de aprilo, sur la premio-disdona ceremonio de la 15-a Ĝeneva Internacia Ekspozicio de Inventoj kaj Nova Tekniko, Ĉinio akiris 47 medalojn, inter kiuj estis 2 specialaj, 13 oraj, 13 orumitaj, 12 arĝentaj kaj 7 kupraj. 45 el la 50 ĉinaj eksponaĵoj estis premiitaj.

ORAJ MEDALOJ POR KVIN EKSPONAĴOJ DE ĈINIO

Kvin eksponaĵoj de Ĉinio gajnis orajn medalojn en la Lepsika Printempa Foiro de 1987, kio estas la plej sukcesa por Ĉinio en la okazintaj lepsikaj foiroj. La kvin eksponaĵoj estas: Aŭtomata pakmaŝino por grajnoj produktita de Tjanĝin, fora-infraruĝa bakforno

de Kantono, maŝino por ĝjaŭzi kaj ĉunĝjŭan (manĝaĵoj de ĉinoj, faritaj el tritikfaruno kaj farĉo) de Hejlongĝjang-provinco, enladigitaj persiko kaj nepecigita fungo kun marko "Ma Ling" produktitaj de Ĝeĝjang-provinco.

ĈINA AKUPUNKTURO AL LA MONDO

De post sia fondiĝo en 1978, la Internacia Akupunktura Trejna Centro funkciigita en Ĉinio jam kulturis pli ol 1 200 akupunkturistojn por 64 landoj kaj regionoj de la mondo. La centro havas sub si tri filiojn en Pekino, Ŝanhajo kaj Nankino. La celo de la centro estas konigi al la mondo la ĉinan tradicion medicinon. Niĝeria diplomito el la nankina filio starigita en la Nankina Ĉinmedicina Instituto sukcesis en akupunktura anestezado por cefalofirurgia operacio al paciento de kraniorompiĝo.

La ĉina akupunkturo disvastiĝis al pli ol 100 landoj kaj regionoj, kaj pli ol 30 landoj aplikis akupunkturiston en anestezado. Nun 116 landoj kaj regionoj petis Ĉinion trejni por ili akupunkturistojn.


NOVAJ ATINGOJ DE ĈINAJ SPORTISTOJ

La 20-an de marto en Havano ĉina juna sportistino Li Dujhong gajnis ĉampionecon en la mondopokala konkurso por virina sporta pafilo.

La 27-an de la sama monato ĉina sportistino Ma Ŝjangĝjun gajnis la ĉampionecon superinte ĉiujn rivalojn en la internacia arkopafa konkurso. Ŝi estas la unua ĉina sportisto, kiu gajnis ĉampionecon de tiu konkurso.

En la 29-a de marto ĉina sportistino Jan Hong rompis per 21'20''2 la mondan rekordon 21'26''5 kreitan de alia ĉina sportistino Ĝuan Ping en 5 000-metra stadiona kalkanmarŝo en 1986. La 31-an de marto, 24-jara sportistino de Ljaŭning-provinco kreis mondan rekordon per 44'26''5 en 10 000-metra stadiona kalkanmarŝo de plenkreska virino.

Post 13-monata intensa batalo, fermiĝis en Tokio, la 30-an de aprilo 1987, la Dua Ĉina-Japana Vejĉia Konkurso. Ĉina ĉefludisto Nje Ŭejping venkis kvin japanajn rivalojn, kaj tiel Ĉinio gajnis la finan venkon per 9:8.



Akupunkturisto de la trejna centro faras demonstradon al fremdlandaj lernantoj.

Por ke ĉiu familio havu apartamenton

1987 estas la "Internacia Jaro por Ŝirmi Senhejmulojn" difinita de UN. Tio memorigas nin pri la grandaj sukcesoj de konstruado de loĝdomoj, kiujn ni vidis en la Germana Demokratia Respubliko. Nun ĉiu loĝanto en GDR posedas loĝejon kun meznombra plank-areo de 26 kvadrataj metroj, inkluzive tiun de la kuirejo kaj vestiblo, tio ebligis al la lando enviciĝi inter la avangardaj landoj tiuflanke. La nova kvinjara plano de GDR destinas, ke ĉiu familio havos unu apartamenton kun modernaj ekipaĵoj antaŭ 1990.

Antaŭ nelonge ni vizitis GDR kaj informiĝis pri ĝiaj spertoj

en konstruado de urboj kaj vilaĝoj. Ni propraokule vidis, ke en la pasintaj 37 jaroj la popoloj de GDR jam rekonstruis sian hejmlokon sur la ruino de milito. Ĉu en la urboj Berlino, Lepsiko, Dreseno, Magdeburgo kaj Halle, ĉu en vilaĝoj kaj urbetoj, kiujn ni preterpasis survoje, ĉie vidiĝas vicoj da diversaj belaj konstruaĵoj. En la urboj ĉefe estas ses-etaĝaj loĝdomoj akompanataj de altaj domegoj de lernejoj, magazenoj, hoteloj k.a. Ili formas vari-riĉan harmonian tuton. Inter la etaĝdomoj estas promenejoj. Ambaŭflanke de stratoj dense ombras arboj kaj kreskas floroj kaj herboj, inter kiuj estas belaj

En kvartalo de Weimar



Antikvaj loĝdomoj

artaj skulptaĵoj. Antaŭ multaj gravaj konstruaĵoj troviĝas fontanoj. Estante tie, oni sentas grandan ravon.

Novaj loĝdomoj en GDR ĝenerale estas konstruitaj el armittaj betonplatoj. En Lepsiko funkcias tri fabrikoj de antaŭpretigitaj konstru-partoj. Unu el ili, kiun ni vizitis, kun pli ol 600 laboristoj kaj administrantoj, povas liveri konstru-partojn por 4 300 apartamentoj ĉiujare. Estas interese, ke la antaŭpretigitaj konstru-partoj estas faritaj de la fabriko kun muntitaj pordoj kaj fenestroj, kaj la tualetejo estas farita kun ĉiuj akcesoraĵoj. Tio multe mallongigis la konstru-tempon. La konstru-tempo de loĝdomo kun plank-areo de ĉ. 4 000 kvadrataj metroj ĝenerale estas 3.5 monatoj. Ni vizitis loĝdomon antaŭ nelonge konstruitan, kun modernaj hejta,

akvo-kondukta kaj gasolivera instalaĵoj. Ĝia apartamento por novgeedza paro havas plankareon de ĉ. 50 kvadrataj metroj.

Krom dediĉi multajn laborfortojn kaj monrimedojn por konstrui novajn loĝdomojn, GDR metas grandan atenton ankaŭ al riparado de malnovaj domoj. Sur konstruejo en la centro de Lepsiko, ĝenerala inĝeniero konigis al ni, kiel ili laboris sur la malvasta konstruejo por renovigi la malnovajn loĝdomojn. Ili ekipas la malnovajn domojn per modernaj akcesoraĵoj, ke oni vivu en malnova domo komforte samkiel en la nova. Oni renovigas kaj fortikigas la fasadojn de malnovaj loĝdomoj frontantaj al strato, ke ili konservu sian antikvan, simplan aspekton kaj

bone harmoniu kun la najbaraj novaj loĝdomoj. Je la unua vido oni malfacile distingas la malnovajn loĝdomojn zorgeme renovigitajn de la arkitektoj kaj laboristoj de la novaj. Dank' al tio, ĉiu urbo bone konservas sian propran arkitekturan stilon, diferencantan de tiu de alia urbo.

Loĝdomoj en la vilaĝoj kaj antaŭurboj havas pli rimarkeblajn trajtojn. Duetaĝaj domoj kaŝiĝas inter fruktaj aŭ alispecaj arboj. Malantaŭ la fenestroj pendas blankaj kurtenoj kun belaj desegnoj. En la korto bonorde kuŝas agrikulturaj maŝinoj kaj instrumentoj. La fruktoj sur pomarboj klinas branĉojn kaj laktobovinoj maĉas sur la herbejo. Vere estas kampara pejzaĝo en kvieta atmosfero.


Survoje ni ofte vidis "vilaĝojn" ĉiun el cento da ĝardenetoj kaj malaltaj dometoj. Ni informiĝis post pridemando, ke ili estas simplaj kamparaj vilaĝoj starigitaj de la registaro por urbaj loĝantoj, precipe por tiuj en la loĝdomoj el antaŭpretigitaj armitaj betonplatoj.

Krome, multaj entreprenoj konstruis feripasigajn vilaĝojn ĉe marbordo aŭ aliaj turismaj lokoj, kie oficistoj kaj laboristoj povas ĝui feriojn laŭvice.

Germanaj kolegoj diris al ni, ke en 1981-1985 ili konstruis kaj renovigis milionon da apartamentoj. En 1986-1990 ili konstruos kaj renovigos pli ol milionon da apartamentoj, tiam ĉiu familio posedos unu moderne ekipitan apartamenton. □

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIŬ NUMERO

1. Serŝju
2. Kangding
3. Ĝangĝoŭ
4. Ĉjŭanĝoŭ
5. Ĉangŝa
6. Uhan
7. Ĉingdaŭ
8. Ĉengdu
9. Ĉifeng
10. Ljaŭning-provinco



ĈINAJ POŝTMARKOJ


Poŝtmarkoj
pri birdoj

de LU ŜJANG



Utilaj birdoj estas protektataj en Ĉinio. Poŝtmarkoj pri birdoj estas tre ŝatataj de la ĉinaj filatelistoj. La supraj tri pecoj kun bildoj de ora fazano estis emisiitaj en 1979. Ora fazano kun belaj plumoj simbolas riĉecon. La mezaj kvin emisiitaj en 1982 konigas utilajn birdojn. La tri malsupraj-dek-

straj, emisiitaj en 1986, surhavas pentritajn grupojn, kiujn la ĉinoj rigardas kiel simbolon de longviveco. La lastaj kvar emisiitaj en 1983 surhavas pentritajn cignojn, kiujn la ĉinoj opinias ambiciaj birdoj pro ilia longdistanca flugado.





Peizaço de Uling

Foto de KANG JI